

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

# Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՔԱՆՅԱԼԻ  
ՅԵՐԱՅԵՆԻՔՄԱՋԸՄԱՅ

**Ĉi-numere legu pri:  
KATASTROFAJ INUNDOJ EN KROATIO, SERBIO  
KAJ BOSNIO KAJ HERCEGOVINO  
LA 100-a DATREVENO DE TOVE JANSSON  
BOŠKO BUDISAVLJEVIĆ - PRANEVO DE  
LA INVENTISTO NIKOLA TESLA  
DE KILIMANĜARO AL AKONKAGVO  
ESPERANTISTOJ ĈE IVO JOSIPOVIĆ,  
LA ŜTATPREZIDENTO DE KROATIO**

**2**

**2014**

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

## Plenumredaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

## Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

## Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana  
Habulin, Marija Jerković, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Josip Pleadin

## Presis:

Grafokom, Đurđevac

## Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

## Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

## aŭ al UEA-konto:

deoc-f

## RESUMO

Dum la ĉi-jara majo, la regionojn de Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Serbio trafis katastrofaj inundoj, kun ankoraŭ nemezureblaj damaĝoj. La popoloj de la tri ŝtatoj travivis la plej terurajn momentojn de sia vivo, pri kio ni povas nur "pale" raporti al vi per niaj ĉi-numeraj artikoloj.

En la periodo inter la du numeroj de nia revuo, la esperantistoj de Kroatio okazigis jarkunvenon de sia landa asocio kaj preparis sin por la plej granda ĉi-somera evento, la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka. Tiukaze, la delegacio de esperantistoj estis akceptita de la ŝtatprezidento Ivo Josipović. Ni notas novajn aktivecojn de kroataj Esperanto-societoj, kiuj montras la tenacon de la enlanda movado.

Atente vi sekvu la vojaĝon de Amri Wandel el Israelo laŭ la spuroj de Tibor Sekelj, kaj rememoru pri la centjara naskiĝdatreveno de fama sveda artistino Tove Jansson. Legu ankaŭ pri la centa naskiĝdatreveno de kroata esperantisto Ivo Ŝutalo. Per la intervjuo kun Boško Budisavljević, pranevo de la fama inventisto Nikola Tesla ni kompletigas la bildon pri la famulo, pri kiu ni jam skribis en unu el niaj pli fruaj numeroj.

Ni mencias la Duan Eŭropan festivalon de Esperanto-kantoj kiu okazis en Vroclavo (Pollando), kaj anoncas por la 6-a fojo boatadon sur la rivero Kupa, kiun tradicie organizas esperantistoj de Sisak, kunlabore kun la regionaj Esperanto-societoj.

El la kroata hisotrio ni elektis rakonton pri la Respubliko de Poljica. Ni mencias bonajn ekzemplojn el la esperantista praktiko: la kursejon de Seulo, sed ankaŭ malbonajn el nia proksimeco: la obstinan intencion malfondi la antaŭ nelonge fonditan societon en Križevci.

Publikaj informmedioj tre favoris nin, kaj ni prezentas al vi liston de novaperintaj mencioj de Esperanto.

Ĉu vi antaŭe aŭdis pri Esperanto-sumoo? Ne, ĝi ne estas lukto de dikaj esperantistoj, sed klopodo instigi esperantistojn legi librojn. Pri la iniciato de Hori Jasuo el Japanio informas nin turka adepto de Esperanto-sumoo.

Nekutime multe da spaco en ĉi tiu numero ni dediĉis al fervojistaj esperantistoj. Ni raportas pri la IFEF-kongreso okazinta en Italio, sed prezentas ankaŭ analizon pri prezoj de pasaĝera transporto en Kroatio. Tian atenton kroataj fervojistoj-esperantistoj meritas aparte pro la fakto, ke ilia societo en decembro ĉi-jare fariĝos 60-jara.

Jam multaj temoj atendas nin por sekva numero. Se vi volas ion komuniki al ni, raporti pri io, komenti la aperintajn artikolojn, nepre faru tion! "Zagreba Esperantisto" daŭrigas sian redaktan politikon de libera kaj malferma gazeto.

# KATASTROFA MAJO 2014

*Redakcia  
kompilo*

La loĝantaro de Bosnio kaj Hercegovino, Kroatio kaj Serbio, ankoraŭ longe memoros la ĉi-jaran majon, dum kiu la tutan regionon trafis katastrofaj inundoj per forto neniam antaŭe spertita. Kvankam la inundoj en Kroatio estis malpli fortaj ol en aliaj du landoj, meteorologoj asertas, ke ili estis la plej grandaj post la disverŝiĝo de la rivero Sava, kiu en 1964 inundis grandan parton de la kroatia ĉefurbo Zagrebo.

Ankaŭ ĉi-maje **Sava**, la rivero kiu prezentas naturan landlimon inter Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino, kaŭzis la inundojn.

Pro abundaj pluvegoj, kiuj en Kroatio estis plej intensaj inter la 11-a kaj 18-a de majo (en Kutjevo falis eĉ 164 litroj da pluvo po kvadrata metro), preskaŭ ĉiuj riveroj de la regiono pleniĝis per akvo ĝis la niveloj neniam antaŭe mezuritaj. La pluvegojn kaŭzis la ciklono, kiun meteorologoj nomis **Donat**. Plej enormaj pluvoj falis dum du ekstremaj tagoj, la 15-a kaj 16-a de majo. Ekzemple, en Osijek dum tiuj du tagoj falis eĉ 69 litroj da pluvo, kio estas meza kvanto por tuta majo.

La plej endanĝerigita estis la regiono de **Posavino** apud la urboj **Županja** kaj **Slavonski Brod**. Tie la rivero **Sava** atingis rekordan akvonivelon, kiu la protektaj digoj ne povis elteni. Ili krevis en la vilaĝoj **Rajevo Selo** kaj **Raĉinovci** la 17-an de majo, pro kio subakviĝis la vilaĝoj **Gunja**, **Raĉinovci**, **Rajevo Selo**,

**Bošnjaci**, **Vrbanja**, **Drenovci**, **Strošinci**, **Đurić**, **Posavski Podgajci** kaj **Soljani**. La loĝantaro de la inunditaj vilaĝoj estis evakuita kaj provizore loĝigita en sportaj haloj kaj lernejoj. Al la inunditaj vilaĝoj helpadis ĉirkaŭ 1000 soldatoj de Kroata armeo, multaj fajrobrigadistoj, membroj de Montara savservo, sed ankaŭ volontuloj el aliaj regionoj de Kroatio, kvankam la ĉefan protekton faris la loĝantaro mem, konstruante digojn, savante homojn kaj bestojn, kaj organizante ĉiaspecan helpon. La malfacila situacio daŭris dum pli ol 10 tagoj, inter la 12-a kaj 22-a de majo. Ekde la 23-a de majo la akvonivelo de la rivero **Sava** komencis malaltiĝi.

Post retiriĝo de la akvo diversaj ŝtataj servoj komencis sanigi la inunditan teritorion. Estis kolektataj kadavroj de dronintaj bestoj, organizita forigo de koto, lavado kaj sekigo de domoj, sed ankaŭ protekto kontraŭ epidemioj. En la tuta lando okazis intensa kolektado de vivbezonaĵoj, nutraĵoj kaj mono, ĉar la loĝantaro ankoraŭ dum multaj monatoj ne povos reveni en siajn damaĝitajn domojn.

En la inundoj multaj konstruaĵoj estis treege difektitaj, kaj estos necese malkonstrui ilin, kaj konstrui novajn. Komisionoj taskigitaj por kalkuli la materiajn perdojn, ankoraŭ ne kuraĝas publikigi definitivajn ciferojn.

*La regiona mapo, sur kiu estas prezentitaj  
proporcioj de la inundoj.*



# UNUIGIS NIN LA TRAGEDIO

*Zlatoje Martinov*

Meze de majo ĉi-jare, katastrofaj inundoj trafis la regionojn de Serbio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Kroatio. La rivero **Sava** kaj la alfluaj riveretoj atingis nekomprenblan akvonivelon kaj en tre mallonga tempo, dum nur kelkaj horoj, inundis la urbojn, vilaĝojn kaj kampojn. Tri landoj alfrontis la plej tragikan situacion en la periodo post la dua mondmilito. Sed nun la vera kunlaboro kaj solidareco inter ili montris, ke la malfeliĉo kaj tragedio povas forte unigi ne nur la homojn sed ankaŭ la ŝtatojn.

Preskaŭ unu triono da okcidenta parto de Serbio, kun la urboj **Šabac, Valjevo, Krupanj, Bajina Bašta, Lazarevac, Varvarin, Mladenovac, Kraljevo, Svilajnac, Ĉuprija, Paraćin** kaj aliaj, estis inundita. Sed tamen la plej inundita estis **Obrenovac**, la urbo kun 30.000 loĝantoj, situanta ĉe la enfluo de la riveroj **Kolubara** kaj **Sava**, kaj nur 25 kilometrojn de **Beogrado**. Ĉiuj domoj estis subakvigitaj laŭlitere ĝis tegmentoj! La stratoj fariĝis akvokanaloj, tre kiuj nur per boatoj la savantoj provadis savi homojn kaptitajn en la propraj domoj. Multaj staris sur tegmentoj de siaj domoj, svingante kaj kriante por helpo. Aliaj, kiuj loĝis en supraj etaĝoj, trafenestre povis rigardi la ruliĝantan torenton kiu konkeradis la stratojn. Pro hasteco de la torento homoj ne sukcesis savi eĉ elementajn posedaĵojn, sed grupe eniradis en savboatojn, fakte nur kun eta envolvajo enmane, multaj ankaŭ sen io ajn! La registaro ordonis la evakuadon de la tuta loĝantaro kaj dum unu semajno la urbo restis malplena, senhoma... Sed la evakuado daŭris dum tagoj, (fakte pli ol unu semajnon!), pro kio multaj restis en la domoj sen elektra kurento kaj trinkebla akvo. La telefonaj konektoj estis

interrompitaj, kaj la savantoj perboate vagadis tra la iamaj stratoj fariĝintaj akvokanaloj, serĉante senhelpajn homojn. Entute nur en **Obrenovac** pereis 27 personoj kaj en la tuta Serbio almenaŭ dekoble tiom. La bildoj de la inunditaj serbaj urboj trafugis la mondon kaj estis vere kortuŝaj. Same okazis pri la bosniaj urboj (ekzemple **Maglaj**) kaj la kroaciaj vilaĝoj apud la rivero Sava (ekzemple, la vilaĝo **Gunja**).

Estas klare ke oni ne povas komplete antaŭvidi kaj kontroli la naturajn katastrofojn, sed same klaras, ke - almenaŭ kiam temas pri Serbio - la tiel nomata "homa faktoro" ludis grandan malbonan rolon. Malpuraj kaj dum jaroj nepurigataj kanaloj, riveretoj kaj riveroj, malnovaj kaj malsekuraj digoj, sed ankaŭ malzorgado de oficialuloj pri precizaj meteorologiaj atentigoj kelkajn tagojn antaŭe - multgrade malfaciligis la aferon kaj kontribuis al la katastrofo fariĝi biblio-skala.

Miloj da personoj en Serbio nun havas nek domon nek posedaĵon. Ili perdis ĉion, kion ili perlaboris dum la vivo. Ili ankoraŭ nun, do monatojn post la kataklismo, vivas en iamaj militaj rifuĝintaj tendaroj, sportaj haloj, kaj eventuale ĉe siaj parencoj. Ekzemple, eĉ hodiaŭ neniu homo

el **Obrenovac** povas reveni al sia hejmo. En tiu urbo oni ankoraŭ ne havas trinkeblan akvon, sed nur la akvon por la t.n. teknika uzo. "Dum unu monato", diris hodiaŭ en la serba televido virino el tiu urbeto, "ni manĝas nur nekuiritan manĝaĵon". La juna ĵurnalisto stulte demandis: "Sed kial vi ne kuiras?" La virino kun miro respondis: "Ni havas nek akvon, nek elektron, nek kuirforon, do, kie, pro diablo, mi kuiru?"

Pasos sendube monatoj kaj jaroj antaŭ ol la situacio en la inunditaj regionoj normaligos. La homa tragedio estas granda, kaj la materiaj damaĝoj grandegaj. Sed kuraĝiga afero estas la serioze montrita homa solidareco. Multaj homoj sindone helpadis al tiuj, kiuj perdis preskaŭ ĉion. Same la registaroj de ĉiuj tri landoj montris, ke en la malfacilaj situacioj ili povas amike kunlabori, kaj kunhelpi inter si. Kvakam okazis tragedio, estus bone se ni ĉiuj ellernis la trafan lecionon, ke la naturaj katastrofoj (inundoj, uraganoj, ŝtormoj, tertremoj, k.s.) ne konas landlimojn, naciojn, religiojn kaj rasojn, kaj ke ni ĉiuj estas nur homoj kun la samaj problemoj, deziroj kaj esperoj. Unuigis nin la tragedio, sed estus pli bone, ke estonte unuigu nin la hejmo.



*La inundita Obrenovac*



# TRAGIKA BILANCO

*Mićo Vrhovac*

Senprecedencaj inundoj, kiuj en majo trafis **Bosnion kaj Hercegovinon** kaj Serban Respublikon, kiu estas ĝia parto, kaŭzis kaoson en la lando. Krom damaĝoj en la infrastrukturo, la inundoj kaŭzis grandegajn perdojn en la agrikulturo, brutobredado kaj, bedaŭrinde, mortis ankaŭ 17 homoj. Multaj vojoj kaj pontoj detruigis, kaŭzante trafikajn problemegojn. Laŭ la komencaj taksoj, la damaĝoj en la akva katastrofo atingas ĉirkaŭ du miliardojn da eŭroj. Konsekvencojn de la inundoj sentas unu kaj duonmiliono da homoj.

Meteologoj taksas, ke mezo de majo en kelkaj regionoj de Bosnio falis ĉirkaŭ 150 litroj da pluvo je kvadratmetro, kio estas rekordo de la lastaj 120 jaroj, dum kiuj okazas regulaj meteologiaj mezuradoj. El siaj fluejoj elverŝigis la riveroj **Drina, Sana, Sava, Vrbas** kaj aliaj. Iliak akvoj inundis la urbojn **Brĉko, Maglaj, Doboj, Derventa, Sarajevo, Prijedor, Travnik, Janja, Bijeljina, Živinice, Vareš, Zavidovići, Banja Luka, Ĉelinac, Šamac** kaj multajn aliajn urbojn kaj vilaĝojn. Pro la grandaj kvantoj da akvo aktivigis multnombraj terglitejoj, kiuj detruis domojn kaj tutajn vilaĝojn. Akvaj torentoj detruis vojojn kaj pontojn, pro kio iuj partoj de la inundita regiono estis atingeblaj nur per boatoj kaj helikopteroj. Kiom serioza estas la situacio montras la fakto, ke pro la inundoj kaj terglitado kelkaj minkampoj el la pasinta milito, antaŭe precize markitaj, ŝanĝis sian pozicion kaj la minoj nun troviĝas en nemarkitaj lokoj.

Pro la morto de multaj bestoj, la civitanojn minacas risko de infektaj malsanoj.

En la defendon de la popolo, ilia havaĵo kaj riparado de damaĝoj estas inkluzivitaj ĉiuj niveloj de la registaro, polico, armeo, EUFOR-uloj, civila protekto, bonfaraj, religiaj kaj sportaj organizoj kaj civitanoj. Sian kontribuon donis teamoj el Aŭstrio, Belgio, Makedonio, Slovenio, Kroatio, Montenegro ... Multaj homoj helpis kaj esprimis grandan solidarecon kun la viktimoj de la katastrofo. Transportaj kompanioj kaj taksistoj senpage transportis ĉiaspecan helpon, kiu venis el Aŭstrio, Germanio, Svedio, Rusio, Usono ... La Registaro de Norvegio donacis 43 milionojn da norvegiaj kronoj (5 milionojn da eŭroj) al Bosnio kaj Serbio. Prezidento de Pakistano Nawaz Sheriff anoncis urĝan asiston al milionoj da Bosnianoj, kaj en la bonfaraj agadoj aktivigis ankaŭ famaj personoj. Ekzemple, Angelina Jolie donacis 50.000 dolarojn por viktimoj en Bosnio kaj Serbio. Apartan humanecon montris la sveda futbalisto Zlatan Ibrahimović kaj la monda boksa ĉampiono Adnan Ĉatić, pli konata kiel Felix Sturm, kiuj havas bosniajn radikojn, dum Vincent Tan, posedanto de Futbalklubo "Sarajevo", donacis 130.000 eŭrojn.

La katastrofo en Bosnio kaj Hercegovino estas nemezureble, kaj la trafita loĝantaro bezonos longtempe helpon de bonfaruloj. Ankaŭ esperantistoj pripensu per kio ili povas kontribui.



dokumentoj per speciala skribo **bosanĉica**. La pastroj de **Poljica** havis multajn konfliktojn kun aliaj dalmataj pastroj, kiuj ĉiam postulis uzadon de la latina en la diservo.

La malvenko ĉe **Klis** en marto 1648 forte impresis la Turkojn, kaj instigis ilin venĝi al Poljicanoj. **Tafan-paŝao** kunvenigis 10.000 soldatojn kaj atakis **Poljican**. En tiu atako estis bruligitaj **Srinjine** kaj **Tugare** en la meza parto de **Poljica**, kaj konkerita la centra parto de la princlando

# LA RESPUBLIKO DE POLJICA

La **Respubliko de Poljica**, kiun en julio 1807 okupis la generaloj de Napoleono, memstare vivis sur la dalmata ŝtonregiono dum plena jarmilo. Ĝi ekzistis pli longe ol la **Respubliko de Dubrovnik**, kaj ĝian heroan spiriton tre bone konis kaj respektis Turkoj, Venecianoj, Hungaroj, Aŭstroj, Francoj kaj aliaj konkerantoj.

La komenco de la memstareco de la **Princlando de Poljica** datas el frua mezepoko, respektive el la 9-a jarcento. Dum ekzisto de malnova genta sistemo, kaj poste ankaŭ dum la tempo de popolaj monarĥoj, **Poljica** ekzistis kiel aparta paroko. Post la jaro 1070, kiam estis elektita la unua granda princo **Dalicio**, la regiono de **Poljica** fariĝis aŭtonoma princlando, gardanta siajn malnovajn rajtojn kaj konstruanta la administran sistemon surbaze de memadministrado. Ekde tiam, ĝis la komenco de la 19-a jarcento, sur mallarĝa montara regiono ĉirkaŭ la monto **Mosor**, troviĝanta inter la riveroj **Žrnovnica** kaj **Ĉetina** kaj la maro inter **Split** kaj **Omiš**, evoluis la **Respubliko de Poljica**.

Dum sia longa ekzisto, tra jarcentojn longaj bataloj kontraŭ diversaj malamiko, ĝi spitis milite, diplomatie kaj taktike. Dum tiu

tempo la urboj **Klis**, **Split**, **Krilo-Jesenice**, **Dugi Rat**, **Omiš** kaj aliaj (krom **Dubrovnik**), estis atakataj de Venecianoj unuflanke kaj de Turkoj aliflanke. Samtempe **Poljica** per diplomataj agoj, kaj per pagado de tributo, ĉiam sukcesis resti libera.

## La pastroj en Poljica uzis la nacian lingvon

En tiu epoko preskaŭ ĉie en **Dalmatio** la oficila lingvo estis la latina, sed en **Poljica** oni uzis la kroatan, en kiu okazadis diservoj kaj estis skribitaj ĉiuj ekleziaj


nomata **Gata**. Nesingardemon de la turka soldataro eluzis Poljicanoj, kiuj dum malhela nokto atakis la Turkojn de tri flankoj, pelis la konkerantojn al krutaj rokoj de **Ilnice** kaj faligis ilin en la abismon. Memore al tiu batalo ekestis legendo pri **Mila Gojsalić**, la belulino kaj heroino, kiu per ruzajo eniris la tendon de la paŝao, sorĝigis kaj ebrigiis lin, kaj fine bruligis la tendon, plifaciligante la triumfon.

## Poljica kaj Thomas More

**Poljica** kiel malgranda landeto de montaranoj havis nek

Supre:  
*La Respubliko de Poljica sur malnova mapo.*

Dekstre:  
*La Statuto de Poljica.*



urbajn palacojn nek potencajn fortikaĵojn kiel **Dubrovnik**. Ĝi ne havis sian historiiston, sed la arkivoj en **Vieno, Venecio, Zadar, Split, Dubrovnik** kaj **Omiš** abundas je detaloj pri ĝiaj agadoj kaj la vivo de la loĝantaro. La krutaĵoj de **Mosor** estis ĝia bastiono, kaj la 12 vilaĝoj (**Podstrana, Jesenice, Duće, Srinjine, Tugare, Gata, Kostanje, Podgrada, Dolac Donji, Dolac Gornji, Putišići** kaj **Srijane**) havis entute ĉirkaŭ 5.000 loĝantojn. Ekonomie ĝi baziĝis je agrikulturo kaj brutbredado, kaj poste je navigado kaj fiŝkaptado.

La oficiala titolo de la lando estis "Estimata komunumo de Poljica", kaj ĝia himno "Estimataj Poljicanoj" ankoraŭ uzatas. Ĝi fondiĝis en la 11-a jarcento, post unuiĝo de la 12 montaraj vilaĝetoj. La demokrata sistemo estas la ĉefa karakterizo de la Respubliko, kaj plej granda kuriozaĵo en tiu epoko.

La statuto de Poljica, kiu datas el la 14-a jarcento, estas kolekto de malnovaj juraj reguloj, bazitaj sur la popolaj kutimoj kaj komunumaj leĝoj. Tiun leĝorajton ege atentis veneciaj *providoroj*

(regionestroj) kaj intelektuloj de tiama Eŭropo. Pere de veneciaj oficistoj, kiel montris la esploroj de la rusa profesoro **Alekseev**, kiu dum kelkaj jardekoj esploris certan influon al la angla literaturo kaj la fama angla filozofo kaj ŝtatestro el la 16-a jarcento, **Thomas More**, sciigis pri la memstareco de la **Respubliko de Poljica**, kies soci-politikaj organizaĵoj, ĝiaj rajtoj kaj ankoraŭ konservita komuna

propraĵo, inspiris lin verki sian "Utopion". Por honorigi la memoron al la legenda belulino kaj heroino **Mila Gojsalić**, la fama kroata skulptisto **Ivan Meštrović** donacis skulptaĵon, kiun oni starigis sur la belega loko sur **Zakučac**, super la enfluejo de la rivero **Cetina** ĉe **Omiš**. Miloj da enlandaj kaj eksterlandaj turistoj vizitas ĉiujare la statuon, kiu fariĝis simbolo de **Poljica**.



*La monumento al Mila Gojsalić*



Verŝajne malmultaj el vi, karaj legantoj, konas la nomon de esperantisto **Ivan Ŝutila** el **Karlovac**. Sed, komence de majo kroataj informmedioj donis al li grandan atenton, pro lia centjariĝo kaj esperantisteco!

Ivan naskiĝis la 3-an de majo 1914 en **Hraŝće Svetičko** ĉe **Ozalj**, en la tiama Aŭstri-Hungario. Li lernis en **Svetice**, kaj poste fariĝis komercista metilernanto. Post tio, la tutan vivon li pasigis en **Karlovac**,

## LA CENTJARULO IVAN ŜUTILA

*Josip Pleadin*

kun la escepto de sep jaroj pasigitaj ĉe la filo en **Afriko**. Kun sia edzino Jelka li havas tri filojn, kaj li vivis plene familian vivon.

Ekde 2007 li vivas en Hejmo por maljunuloj "Sveta Ana" en **Karlovac**, kie oni konsideras lin mirindaĵo, ĉar li estas vigla, sana, leganta sen okulvitroj, okupiĝanta pri solvado de krucenigmoj ktp.

Ankoraŭ dum la junaĝo li fariĝis esperantisto, kaj estis membro de loka societo en **Karlovac**. Preskaŭ certe li estas unu el la lastaj vivantaj partoprenintoj de la lasta nacia (jugoslavia) Esperanto-kongreso, okazinta antaŭ la dua mondmilito en **Karlovac**, en 1938. Ankau en siaj maljunaj jaroj li estas

membro paganta kotizon por loka Esperanto-societo en **Karlovac**, kaj leganta Esperantajn gazetojn.

Li pensiĝis kiel komerca direktoro de la firmao OTP en **Karlovac** en 1973, sed dum sia aktiva vivo dum certa tempo li estis ankaŭ metiisto, magazeniisto, direktoro de komerca entrepreno Dubovac ktp.

Okaze de lia centjara naskiĝdatreveno, estis organizita festo en la Hejmo por maljunuloj kun torto kian maloftaj festantoj povas havi. Ĝi surhavis la magia numero 100!

Bonan sanon kaj longan vivon ni deziras al tiu veterano de nia Movado en Kroatio!

# SUBJEKTIVAJ OPINIOJ POST LA JARKUNVENO DE KEL

 Zdenka Polašek



El 47 membroj de la Asembleo de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), 36 reprezentantoj partoprenis la 10-an de majo en Zagrebo la elektan kaj konstituigan jarkunvenon de KEL. Alvenis reprezentantoj de 15 membriĝintaj societoj kaj de individuaj membroj.

El la ampleksa tagordo mi volus subjektive pritaksi nur du punktojn, kiuj elvokis plej grandan diskuton.

En la laborraporto de KEL kaj ĝia Estraro por 2013 estas menciitaj multnombraj aktivecoj de la membriĝintaj societoj, kiuj estas rezulto de sinofera amatora kaj volontula laboro de unuopaj societoj kaj iliaj entuziasmuloj. Laŭ mia opinio, ni ne rajtas kontentiĝi per tiuj rezultoj, sed ni devas pliprofundigi ilin, kaj intensigi la kunlaboron inter la societoj. La

rezultoj povus esti multe pli bonaj kun faka helpo de KEL kaj sperto-interŝanĝo de societaj aktivuloj. Bedaurinde, la societoj troviĝas en neenviinda financa pozicio, la membraro estas ĉiam pli maljuna, kaj malmultas ekzemploj de plijunigo de la membraro, ĉar al tiu temo oni ne donas sufiĉan atenton. Oni devus konstante labori por amasigi la movadon, kio postulas senĉesan laboron en la reklamado kaj merkatico.

Laŭ mia opinio, same neakceptebla estas malfondi societojn, kiuj antaŭ nelonge fondiĝis (legu la artikolon "Estonteco sen estonteco" en ĉi tiu numero, *rim. red.*). KEL devus entrepreni ĉion eblan por revivigi malaktivajn societojn, kaj stimuli homojn labori. Tial antaŭ la nova gvidantaro de KEL troviĝas multaj

kaj malfacilaj taskoj.

Ankaŭ ĉi-jare el la raporto ni eksciis nur pri la nombro de okazintaj kunsidoj de la Estraro de KEL, sed sen diskutitaj temoj kaj konkludoj de tiuj kunsidoj.

Aprobita estas la Programo de KEL por 2014 kaj 2015, en kiu estas menciitaj "Gvidado de kursoj de Esperanto en la societoj kaj KEL" kaj "Kurso de Esperanto por instruistoj kaj profesoroj". Ne sufiĉas per nura mencio en la laborplano doni tiajn taskojn al la societoj, sed oni devus oferti kompletan kaj senĉesan helpon por ke ili realigu la taskojn. Sen tio ni daŭre havos nur du-tri kursojn jare, kun kelkaj lernantoj, kiuj post la kurso ne fariĝos membroj de lokaj societoj, aŭ – en plej bona kazo – restos nur pasivaj konantoj de Esperanto.



Mi esperas, kvankam tio ne estas menciita en la laborplano, ke realiĝos la deziro de la societoj, ke almenaŭ unufoje jare KEL organizu edukadon por societaj reprezentantoj pri diversaj temoj de la gvidado de societoj (novaj leĝoj, reguloj pri librotenado, sendo de monpetoj al konkursoj de lokaj aŭtoritatoj ktp.).

En la sekva kvarjara mandato la Ligon gvidos: **Anto Minar** (prezidanto), **Spomenka**

**Štítec** (sekretario), **Judita Rey Hudeček**, **Davor Klobučar** kaj **Dalibor Šeatović** (vicprezidantoj), **Boris Di Costanzo**, **Grozdana Grubišić-Popović**, **Faruk Islamović**, **Kaja Farszky**, **Đivo Pulitika** kaj **Vera Roknić** (membroj de la Estraro), dum la kontrolan funkcion plenumos la Kontrola komitato konsistanta el **Roža Brletić-Višnjić**, **Zlata Nanić** kaj **Ljerka Stilinović**.

Ni deziru al la nova gvidantaro multajn sukcesojn. Mi

mem deziras, ke la nova Estraro rekonstruu la "Esperantan etoson" inter la membraro kaj inter unuopaj societoj, por ke ni povu evoluigi kunlaboron inter ni. Mi dezirus, ke ĉiu societo fariĝu konata pro almenaŭ unu specifa aranĝo, kiu fariĝu tradicia.

Mi esperas, ke mi dividas la opinion de granda plimulto de niaj esperantistoj, ke ni devas renovigi la tradicion de organizado de landaj kongresoj.

## “ESTONTECO” *✍ Josip Pleadin* SEN ESTONTECO?

La du lastaj kongresoj de kroataj esperantistoj (okazintaj en Bjelovar kaj Koprivnica), klopodis tiri la landan movadon el letargio. Kvankam ili parte sukcesis, en la landa movado ankoraŭ regas netoleremo kontraŭ tiuj, kiuj postulas ŝanĝojn. La plej freŝa ekzemplo estas la cirkonstancoj en kiuj troviĝas la loka societo "Estonteco" en Križevci.

En la nordokcidenta regiono de Kroatio la Esperanto-movado havas novajn flugilojn, kaj la celo de tieaj aktivuloj estis klare anoncita okaze de la organizado de la jubilea 10-a kongreso en Koprivnica: **konsolidigi la Esperantajn fortojn en la kvarangulo kiun formas la urboj Bjelovar, Križevci, Koprivnica kaj Đurđevac**. En tiu regiono dum nur kelkaj jaroj fondiĝis **Dokumenta Esperanto-Centro** en Đurđevac (2010), **Bjelovara esperantista societo** (2011) kaj **Esperanto-societo "Estonteco"** en Križevci (2012), dezirantaj formi aliancon, kiu komune laboru por Esperanto.

La fondon de la lasta el la tri societoj helpis la du pli frue fonditaj. Ŝajnis, ka la someraj

Esperanto-lernejoj gviditaj de profesoro **Krunoslav Puškar** en Križevci estas bona bazo por fondo de societo, kaj ĝia fondkunveno okazis la 14-an de julio 2012 (vidu la raporton en "Zagreba Esperantisto" n-ro 20, paĝo 13).


Por la societa prezidanto estis elektita la juna lingvisto **Puškar**. La aferoj komplikiĝis ĉar **Krunoslav Puškar** jam de monatoj obstine rifuzas plenumi la taskojn de prezidanto, pravigante tion per manko de tempo kaj per siaj propraj devoj, speciale per pretigo de sia doktoriga laboraĵo. La membraro dum certa tempo silentis, komprenante liajn problemojn, sed poste al li starigis la demandojn kion li intencas fari. Lia respondo estis nepreciza, sed fine el KEL venis la informo, ke li intencas malfondi la Societon. Laŭ mia opinio estas absolute neakceptebla malfondi la societon kiu apenaŭ elkoviĝis! Des pli, ĉar aliaj membroj ne samopinias. Tio elvokis proteston ankaŭ ĉe aliaj du societoj, kiuj helpis al Križevci fondi la lokan organizaĵon. Al profesoro Puškar estis proponite demisii el la prezidanta funkcio (ĉar tio estus normala afero se oni ne povas plenumi la funkcion)

kaj kunvoki eksterordinaran jarkunvenon, kiu decidu pri plua ekzisto de la Societo gvidata de alia prezidanto, aŭ pri ĝia malfondo. Li malkceptis! Rifuzis! Ignoris! Li eĉ arogas diskonigi la malveron, ke (mi citas lian retmesaĝon): "*Por via informo, antaŭ kelkaj monatoj mi MEM malfondis la Societon ... Ĝi ne ekzistas!*". Instigita per tiu aserto, la 31-an de majo 2014 mi konsultis la Registron de asocioj de Respubliko Kroatio kaj konstatis, ke la Societo "Estonteco" ankoraŭ ekzistas. La samon konfirmis kelkajn tagojn poste la estrino de la Oficejo de ŝtata administrado (filio en Križevci), s-ino **Ankica Hadrović**. Ĉe tiu Oficejo la Societo estis registrita, kaj dum la vizito de **Milica Ježovita**, membro de la Kontrola komitato de "Estonteco", s-ino **Hadrović** konfirmis, ke oni ne povas malfondi la Societon per decido de unu persono, sed nur per decido de ĝia eksterordinare kunvokita jarkunveno, kiu neniam okazis. Estas demando kial s-ro **Puškar** deziras je ĉia maniero malfondi la Societon? Pro la propra egoismo aŭ pro io alia? Se baldaŭ ne okazos eksterordinara jarkunveno, la Societo verŝajne ĉesos ekzisti pro neaktiveco, kaj post ĉi-aŭtune ekvaldonta nova Leĝo pri asocioj, ĝi estos viŝita el la Registro de asocioj.

Tio signifas, ke "Estonteco" ne havas estontecon. Kiu kulpas, bonvolu mem juĝi!

# LA 100-a DATREVENO DE TOVE JANSSEN

 Raita Pyhälä



## La Infanaĝo de Tove Jansson

En 1914, promenante sur la trotuaro de la *Rue de la Gaité* (Strato de Ĝojo, Gajeco), la patrino de Tove Jansson sentis la unuajn movojn de la atendata bebo. La patrino mem, mallonge nomata Ham, estis artistino, kiu ilustris librojn, gazetojn, desegnis poŝtmarkojn kaj diligente laboris por siaparte klopodadi kaj enspezi por la familio. Ĉu la nomo de la strato estis bonaŭgura? Ĉiukaze la naskoto, filino Tove Jansson, portis multan ĝojon en la mondon.

En 1914 la minaco de la Unua Mondmilito ŝvebis en la aero. La bebo naskiĝis la 8-an de aŭgusto en Finnlando. Post 2-3 jaroj ŝi jam kutimis sidadi sur la genuoj de la desegnanta panjo. Tiu kutimo fariĝis ŝia unua instruado pri desegniloj, kraĵoj, karbo kaj aliaj iloj por arto.

La patro, Viktor Jansson, estis skulptisto. Lia skulptejo okupis la plej grandan parton de la hejmo en Helsinko, en kvartalo ĉemara, kie staras multaj belaj konstruaĵoj de la Rusa Epoko, en la stilo Arto Nova (*Jugend*), dekoraciitaj per flauraj kaj faŭnaj motivoj. Oni diras, ke tia arkitekturo influis la arton de Tove Jansson ekde la plej junaj jaroj. Same la maro. Ĉirkaŭ la kvartalo etendiĝas la maro ĝis foraj insuloj kaj insuletoj, muĝas la ondoj, blovegas timigaj ventoj, vidiĝas ĝuindaj senventaj somertagoj, kiam oni povas ekveli, fiŝkapti kaj ferii en la insularo. Vintre glacio kovris la maron kaj la ventoj enblovis froston en la loĝejojn. Tiutempe ankoraŭ gravis kahelfornoj kaj hejtado per ligno. Ĉio tio poste aperos en la fabela Muminmondo, kaj se vi jam legis Muminlibrojn kaj vidis ties ilustraĵojn, vi scias, de kie ili venis.

Kiel juna viro la patro Viktor estis serĉema, optimisma, petolema, sed militoj ŝanĝis lin. Li fariĝis retiriĝema, enprofundiĝis en melankolio, ne plu povis – aŭ deziris – esprimi siajn sentojn. Lia menso rompiĝis. En la Ĉivitana Milito (1918) li samopiniis kun la Blankuloj subtenataj de Germanio kontraŭ la Ruĝuloj subtenataj de la naskiĝanta Soveta Unio. Li estis konservativa, sed al li plej gravis la skulptado. Poste, en la ombro de la Dua Mondmilito, li fariĝis antisemitisma. Male, la filino Tove. Kvankam la patro kaj filino tre amis unu la alian, iliaj ideologiaj diferencoj kaŭzis daŭrajn kaj pliĝantajn malsamopiniadojn, krizojn.

La patro ne tre amis virinojn. Virinoj estis nur ĝeno, escepte kiam li bezonis ilin kiel modelojn. Laŭ li virinoj tro laŭte



parolaĉis, havis tro grandajn ĉapelojn en kinejoj, ili ne obeus en milito. Siajn edzinon kaj filinon li ne vere konsideris virinoj. Li skulptis delikatajn statuetojn pri infanoj, tradicie belajn statuojn pri junulinoj, heroajn monumentojn pri soldatoj por tombejoj, idealigitajn virajn figurojn. Al li estis malfacile akcepti, ke li ne sola povis vivteni la familion, sed ankaŭ la edzino devis labori. Tio ja estis kontraŭ la kutimo de tiutempa socio.

La ateliero estis la kerno de la hejmo. Tie staris sakoj de gipso, argilo, tie pendis malsekaj ĉifonoj ĉirkaŭ nepretaj statuoj, tien venadis la geamikoj. Ili ĉiuj estis svedlingvaj artistoj, kio izolis ilin de la finnlingva loĝantaro. Fakte, familo Jansson ne komprenis homojn, kiuj ne estis artistoj! Kiam ili festis en la ateliero, tio daŭris ĝisnokte, ĝismatene, eble eĉ dum du tagnoktoj. De sia dormobalkoneto la filineto Tove observadis kaj aŭskultis ĉion: interparoladojn, ebriiĝon, kantadon de patriotismaj kantoj, militmemorojn, bajonet-atakojn kontraŭ korbofotelo, laciĝon. Ŝi enspiris tabakfumon kaj sentis la odoron de alkoholaĵoj. Antaŭfeste ŝi rimarkis, ke nur la patrino rajtis senpolvigi la artaĵojn, sed eĉ ŝi ne rajtis tuŝi la memoraĵojn el la milita tempo de paĉjo.

Iam Tove-infano malsanis pro rubeolo. Ŝi kuŝis sur sia dormobalkono, observadis, kion

Paĉjo sube faras. Li dorlotis sian simion Popolino, vestis ĝin, eliris promeni kun ĝi, ignorante la malsanan infanon. En la libro *Filino de skulptisto* Tove rakontas multajn faktojn pri sia infanaĝo, ŝi ankaŭ rememoras imagaĵojn, kiujn ŝi kreis enkape. Ŝi flugigas ĉiujn urbanojn kiel birdojn en la ĉielo, por ke ĉiuj estu feliĉaj kaj povu pikniki sur la tegmentoj, ferii kiel ili deziras, sen devi iri al laborejo. Ŝi rakontas pri siaj infanaĝaj timegoj, ĝojoj kaj elreviĝoj. Jen unu ekzemplo: ŝi trovis ŝtonegon el arĝento, per kiu ŝi intencis riĉigi la familion por ĉiam. Pene ŝi rulis ĝin trans la stratoj kaj tramo-trakoj al sia hejmdomo, provis levi ĝin de ŝtupo al ŝtupo ĝis la kvina etaĝo, sed ŝi perdis siajn fortojn kaj la arĝenta ŝtonego falis malsupren laŭ la ŝtuparo, bruante kaj diserigante. Poste la plenkreskuloj ne komprenis, kiu tiel malpurigis la ŝtuparon. Ŝi rakontas pri Julio (Kristnasko), kiel ili ĉiujare konstruis la tradician kripjon (sed foje la simio manĝis la vaksan Jesuo-bebon kaj panjo faris novan el argilo). Ŝi memoras, kiel ŝi sentis sin sekura sub la granda festoarbo, piceo, kiel solene patro lumigis la kandelojn unu post la alia, kiel oni legis la evangelion, kiel kraketadis la donacpapiroj kaj kiel bone oni dormis post tio. (Ŝi ankaŭ malkaŝas, ke jen kaj jen la patro bezonis drinkaĵeton por elteni tian solenon.) Pri sia infanaĝo ŝi rakontas ankaŭ en *Sommarboken, Somerlibro*.

Tove Jansson ne tre ŝatis vizitadi lernejon. Ŝi senesperigis ekz. pro matematiko. En la aĝo de 15 jaroj ŝi rajtis ĉesi frekventi ordinaran lernejon kaj ekvizitadi artolernejon en Helsinko en la aĝo de 16 jaroj.

## Adoleskanto, plenkreskulo

Tove fariĝis junulino, ne tre alta, ne granda korpo. En ŝia

kapo koviĝis ambicioj kaj en ŝia korpo moviĝemo. Ŝi ŝatis danci, moviĝi, desegni, verki. En la familio estis naskiĝintaj du fratoj, La fratino amis la fratojn, kaj la loĝejo ne estis granda, kaj kun la patro Tove konflikte rilatis. Fariĝinte plenkreskaj, la fratoj helpis sian fratiron en ŝia artista kariero.

La patrino *Signe Hammarsten* devenis de pli riĉa sveda familio kun fortaj ligoj al la sveda eklezio. Post la ĉesigita lernevizitado Tove rajtis ekloĝi ĉe sia onklo en Stokholmo kaj studi en tiea artlernejo dum 3 jaroj. Ŝi decidis lerni precipe dezajnon kaj kiel desegni aĵojn. Detaleta de tiu tempo: Kiam Tove provis kaŝpreni manĝaĵojn el la ŝranko de la onkla familio, la onklo pensis kuraci la ŝteliston rakontante, ke en la ŝranko loĝas malbonvolaj nigraj estaĵoj *Mumin* kaj ŝi gardu sin de ili. La unuaj mumintroloj desegnitaj de Tove estis ĝuste tiaj, nigraj kaj ne dikaj, iom timindaj.

En 1933 la familio translokiĝis en loĝejaron, konstruitan en Helsinko dank' al mecenata komercisto. Tove studis en Helsinka artlernejo *Ateneum* ĝis la jaro 1937. Tiam Finnlando ne havis bonajn konektojn al eksterlanda artomondo kaj la junaj artstudentoj trovis la instruadon teda, neutila, tro konservativa. Ili rebelis kontraŭ la instrumanieroj de sia lernejo. Pli gravaj ol la unuaj instruistoj al Tove estis artistaj amikoj pli aĝaj ol ŝi mem. Kun kelkaj el ili ŝi havis amrilatojn – animrilatojn, kiuj poste daŭros dum ilia tuta vivo, malgraŭ novaj enamiĝoj. Por la patro Viktor tio estis ĉiama kaŭzo de kontraŭstaro. Tove multe interrilatis kun la nemultnombra svedlingva artistaro en Helsinko. Tie ŝi konatiĝis kun maldekstrulaj ideoj, kiuj malplaĉis al la patro. Tove neniam vere politikumis, sed ŝi estis pacifisto. La plej grava afero por ŝi estis libero. Ŝi pridubis la kutimajn pens-manierojn

kaj moralon, ŝi estis kreema, ŝi volis sendependiĝi kaj esti aprezata same kiel viroj. Tio pli kaj pli distancigis la patron kaj filinon. Tamen Tove loĝis kun la gepatroj kaj la du fratoj ĝis la aĝo de 27, ĝis la komenco de la 1940-aj jaroj.

En 1934 Tove kun sia patrino vojaĝis al Germanio, kie ŝi vidis pentraĵojn de kubistoj kaj impresionistoj. Tio forte impresis ŝin. Ne kubismo allogis ŝin sed impresionismo jes. En 1936 ŝi trovis por si la unuan propran ejon por pentri en Helsinko, en 1940 atelieron. Al ŝi la lokoj, ĉambroj fariĝis motivoj por pentraĵoj. La pentraĵo *Blua hiacinto sur fenestrobreto* (1939) estas unu el ŝiaj plej konataj verkoj. En 1938 ŝi, dank' al stipendioj, povis vojaĝi al Parizo kaj Bretonio, en 1939 al Italio.

La pentraĵoj de Tove vekis admiradon kaj laŭdojn. Ŝiaj antaŭmilitaj pentraĵoj diferencas de tiuj, kiujn ŝi faris postmilite. La fruaj pentraĵoj enhavas ion mistikan, fabelan, fremdan. Ili montras ŝian inklinon rakonti, kelkfoje sur grandaj toloj, kiuj kondukas la rigardanton super banalaĵojn, jen en fabelon, jen en la enon de homa animo. La pentraĵoj tamen ne estis sufiĉe lukraj. Ŝi desegnis poŝtkartojn, ilustris gazetojn kaj librojn, faris reklamojn por perlabori monon por ĉiutaga vivo. Ŝia ekslibriso surhavas la vortojn *Laboru kaj Amu* en la latina. Same nomiĝas la biografio, kiu aperis finne kaj svede en la pasinta jaro (2013) En 1942 Tove pentris memportreton, kie ŝi surhavas kolpeltaĵon el felo de linko. Ŝi diras pri si mem, ke ŝi ne estas tre bela, ŝi havas malvarmajn verdajn oblikvajjn okulojn, nefrizitan hararon malantaŭen kombitan. La biografisto diras, ke ŝi kuraĝe rigardas al la futuro kaj plenas de memfido. Ŝi mem diris, ke ŝi similas al kato.

La militaj jaroj estis

malfacilaj al ĉiuj. Memfido, espero kaj forta deprimado vice aperadis. Soldatiĝintaj filoj de geamikoj mortis en la fronto, same unu amata instruisto de Tove. Helsinki estis bombata; vestaĵoj, nutraĵoj mankis; judaj geamikoj fuĝis al Usono. La milito sonis je rompiĝado kaj diserigo, je honoraj kanonpafoj kaj timbejoj. Homoj provis freneze amuzi sin, dancante kaj drinkante pro kuniĝintaj vivdeziro kaj timego de morto. De tempo al tempo ili sidadis en ŝirmejoj pro la bombardado.

Sidante en la ŝirmejo kaj timante bombojn Tove sentis sin tiom senespera, ke ŝi deziris elpensi ion konsolan, fabelan, sekuran, per kio ŝi povus ekskludi timojn kaj suferojn. Ŝi volis amuziĝi, fuĝi en fabelmondon. La Mumin-fabeloj komencis naskiĝi ĝuste pro la milito. En 1945 kara amiko kuraĝigis ŝin eldonigi siajn rakontojn kiel libron. Kelkaj kritikistoj plendis pri ĉar la figuroj en Muminmondo ne ĉiam bone kondukas, ili povas drinketi palmovinan, sakri. Dum la bombadoj Tove certe ne deziris verki gvidlibrojn pri infanedukado. Ŝi ne filozofiumis, nek havis iun alian tendencon ol distri. En kelkaj landoj longe daŭris, antaŭ ol ŝiaj Mumin-fabeloj estis aprobataj. El la rakontoj elpensitaj kiel medikamento kontraŭ deprimado ŝi kompilis, pro la konsiloj de la amiko, la unuan Mumin-libron en 1945, kompreneble en la sveda lingvo, ĉar ŝi ĉiam verkis en sia gepatra lingvo, la sveda. Finnlingvanoj ne atentis la libron; en la finna ĝi estis eldonita nur en 1991 – pli ol 45 jarojn post la sveda eldono. Tiam Mumin-fabeloj jam furoris en aliaj landoj. Nun libroj de Tove estas eldonitaj en kvindekda lingvoj.

Por Tove la milita tempo ne estis nur tempo de timo, deprimado, pentrado kaj fabelado. Ekde la aĝo de 15 jaroj Tove faris desegnaĵojn por karikatura gazeto *Garm*. En la milita tempo ŝiaj desegnaĵoj

ekmontris ŝiajn pacifismon, kritikadon de milito ĝenerale kaj pri sinjoroj Hitler kaj Stalin precipe. En ŝia desegnaĵo pri pupvendejo, la pupoj ne plu diras *Mamma* sed *Heil Hitler*. Ili havas svastikojn surveste. Sur la kovrilfolio de *Garm* por la nova jaro 1943 ŝi desegnis la finiĝantan jaron kiel ĉifonan maljunulon, kiu portas amason da militaĵoj: militŝipeton kiel ludilon, bajoneton, glavon, pafilon, tankon, gasmaskon, municion, surrogaton karotan anstataŭ verajn nutraĵojn, karton por porciumi sukeron, buteron kaj aliajn bezonataĵojn. La flugilhava delikata etulo 1943 deprenu de la maljunulo ĉion tion! Cenzuristoj baldaŭ komencis averti la gazeton pri la enhavo de la desegnaĵoj de Tove, kaj unu gazeto, *Ny Tid (Nova Tempo)*, ĉesis aperigi ŝian bildstriojn pri Muminmondo.

En la tumulto kaj kaoso de la milita tempo Tove revis, ke ŝi povus fondi artistan kolonion en iu kvieto, ekzota insulo. Pri revoj de edziniĝo kaj konvencia amo ŝi rezignis. En 1947 ŝi skribis en letero al amikino: "... mi ne volas edziniĝi. Mi memoras ĉiujn virojn kiuj malaprezis, vundis ... (mi memoras) la ŝirmatan lojalan privilegian komunumon de viroj, ilian malkapablon kaj indiferenton ... Mi ne havas tempon admiradi kaj konsoli ilin ... Mi kompatas ilin. Mi ilin ŝatas – sed mi ne volas eluzi mian vivon en scenoj kiujn mi travidas. Kaj kio okazos al mia pentrado, se mi edziniĝos? ... Aŭ mi fariĝos malbona artisto, aŭ malbona edzino. Se mi fariĝas bona edzino, la laboro de mia edzo al mi estus pli grava ol mia propra, mi subiĝus al li kaj naskus infanojn, kiujn la sekva milito mortigus. Mi havas nek tempon, nek deziron, nek monrimedojn por edziniĝo."

Nur en la 1950-aj jaroj vivo en Finnlando komencis normaligi, sed la malriĉo kaj mankoj daŭris ĝis la jaro 1956. En 1951 Tove faris longan vojaĝon kun

sia koramikino Vivica Bandler al Italio, Norda Afriko kaj Parizo. La du virinoj travivis fortan enamiĝon kaj feliĉon. En 1955 Tove starigis ekspozicion pri siaj pentraĵoj en Helsinka salono; la antaŭa ekspozicio okazis 9 jarojn pli frue kaj tiam la kritikistoj vundis ŝin, ne vidante multon bonan en unu pentraĵo al ŝi tre grava, *La Familio*, kie ŝi montris siajn gepatrojn, fratojn kaj sin mem en pozoj kaj situacio tiaj, ke oni povis multon vidi kiel priskribon pri la familia vivo kaj la milita tempo. Oni demandis, ĉu tio estas rakonto aŭ pentraĵo. Male, en 1955 la ekspozicio sukcesis, la kritiko estis modere bona kaj oni aĉetis plurajn ŝiajn pentraĵojn, kvankam kelkaj Finnlandanoj jam konsideris ŝin fabelistino, kreinto de Mumin-libroj, ne pentristino.

Pro siaj verkoj Tove Jansson ricevis dekduon da premioj, sed pli ol ilin ŝi sopiris aprobadon kaj aprezaĵon de geamikoj. Inter la premioj mi menciis *Premion Christian Andersen* en 1966, la literaturpremio de la Finna Ŝtato donitan al ŝi trifoje, grandan Premion de la Sveda akademio.

Tove ilustris ne nur siajn proprajn Mumin-librojn, sed ankaŭ dekon da verkoj de aliaj verkistoj: R. R. R. Tolkien, Lewis Carroll kaj aliaj. Ŝi desegnis Mumin-bildstriojn inter la jaroj 1945 kaj 1961. En la kvindekaj jaroj la strioj aperadis en 40 landoj en 60 lingvoj. Kiam ŝi laciĝis pro la devo krei ĉiam novan bildstriojn por angla gazeto, ŝia frato Lars daŭrigis la desegnadon kaj angligadon.

En Esperanto aperis nur novelaro *Muminvalo aŭ La nevidebla infano kaj aliaj rakontoj*, elsendigita de Eckhard Bick. Eldonjaroj 1984 kaj 1993.

La Mumin-libroj verkitaj de Tove nombras dekduon. Ĝuste per tiaj libroj kaj bildstrioj ŝi donis multan ĝojon al la mondo. Miloj da legantoj skribis dankleterojn al ŝi. Al la leteroj de infanoj ŝi

ĉiam respondis propramane. Ankaŭ aliaj beletraĵoj el ŝia plumo nombras dekon: novelaroj, rakontoj membiografiaj aŭ ne, romanetoj. Aldone teatraĵoj kaj kunlaboro en la teatra prezentado, en ekspozicioj kaj kun filmistoj. Japanoj volis filmi Mumin-rakontojn, sed ŝi forte malsamopiniis pri iliaj planoj, kiam ili volis havi kolorojn por la tradicie blankaj muminoj kaj precipe kiam Japanoj deziris havi militajn scenojn en la filmo. Tiam ŝi rompis la rilatojn. Tamen ĝuste japanaj animaciaj filmoj famigis la Mumin-familion kaj ties kreintinon en la tuta mondo.

Finfine Tove mem eklaciĝis pri siaj muminoj. Ŝi desegnis en privata letero bildeton, kie ŝi kolere forbalaas la tutan grupon. Ŝi turniĝis al verkado de noveloj kaj rakontoj por plenkreskuloj. Ŝi verkis ankaŭ radioteatraĵojn. En 1996, kun sia vivkamaradino, grafikisto Tuulikki Pietilä, ŝi aperigis libron pri la insuleto Klovharu, kie ili pasigis ĉiujn somerojn. La libro enhavas multajn fotojn de frato de Tove.

Nova hobbio por Tove kaj Tuulikki kaj ilia amiko kuracisto fariĝis konstruado de tri-dimensiaj

scenoj pri la okazintaĵoj, lokoj kaj konstruaĵoj en la Muminmondo. Tiuj “scenoj” estas pejzaĝoj kaj pupoj en travideblaj kestoj. Ili priskribas tion, kio okazas vorte en la Mumin-libroj. En 1986 ili donacis siajn ĉarmajn konstruitaĵojn kun pli ol 1000 originalaj ilustraĵoj al la artomuzeo en Tampere. Dum la Universala Kongreso de Esperanto en 1995 la ekspozicion oni povis vidi en la urba biblioteko. Nun ĝi estos translokita en la tiaman kongresejon, Tampere-halon.

Kiam Tove Jansson fariĝis 80-jara, ŝi la lastan fojon partoprenis publikan eventon. Tio estis festo omaĝe al ŝi en Tampere. En la 1990-aj jaroj ŝi malsaniĝis je mamkancero kaj pulmokancero, delonge ŝi ja fumis kaj jam en infanaĝo enspiris la tabakfumon en la ateliero de la hejmo. Ŝi ne plu povis pasigi la somerojn en la insuleto Klovharu. La maro, kiun ŝi amis, nun komencis timigi ŝin, ĉar ŝiaj fortoj malpliigis. Ŝi mortis en helsinka hospitalo la 26-an de junio 2001 en la aĝo de 86 jaroj.

En Helsinko oni trovas kelkajn ĉarmajn virinajn skulptaĵojn, kiujn la patro Viktor faris uzante sian sveltan filinon

Tove kiel modelinon. Plie, proksime al la infanaĝa hejmo de Tove, estas fondata parko omaĝe al ŝi. En vendejoj oni vendas produktojn tolajn, ceramikajn, kartonajn, metalajn, plastajn, paperajn kun temoj el la Mumin-mondo. Pri la kopiraĵoj kaj la financo zorgas tre aktiva kompanio *Moomincharacters Ltd*, kiun estras ŝia juna parenkaro. Granda ekspozicio pri ŝia arto estos malferma ĝis la 7-a de septembro 2014!

La jubilea jaro de Tove Jansson kaŭzas ekspoziciojn, koncertojn, teatraĵojn, filmoprezentadojn ankaŭ en Svedio, Norvegio, Ĉeĥio, Pollando, Hispanio, Francio, Britio, Germanio, Kenjo (sic!) kaj precipe en Japanio, kie kelkaj ekspozicioj komenciĝos nur en 2015. UNICEF, la Infana fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, dum 2014 uzas temojn el la verkoj de Tove Jansson por kolekti monon por la edukado de infanoj. Pri ĉio tio vi trovos multon en la interreto, ekz ĉe [www.tove100.com](http://www.tove100.com), bedaŭrinde nur angle, kaj ĉe [www.tove100.fi](http://www.tove100.fi) finne. Vi trovos ankaŭ fotojn kaj bildojn.

Ni ĝoju pri la verkoj de la multflanka artistino Tove Jansson!

## UPE-JARKUNVENO

*✍️ Marija Jerković*



La ĉi-jara jarkunveno de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) okazis la 10-an de majo en Zagrebo, en la ejo de la Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo. Estis akceptitaj la raportoj (laborraporto kaj financa raporto) kaj diskutitaj aktualaj temoj de UPE: la invito de de Bjelovar por gastigi ILEI-konferencon, programo de instruado de Esperanto kunlabore kun Turisma asocio de Zagrebo (pretigita de Marija Jerković), partopreno kaj prelegoj en la ILEI-konferenco en Montevideo, Deklamkonkurso en Bjelovar ktp. Akcentita estis la neceso plifortigi la Unuiĝon, plimultigi la membraron, kaj efektiviigi la planon de instruado de Esperanto kaj varbado.

# BOŠKO BUDISAVLJEVIĆ, Radenko Milošević

## PRANEVO DE NIKOLA TESLA

En la numero 22 de "Zagreba Esperantisto", okaze de la 100-a mortodatreveno de **Nikola Tesla**, ni skribis pri tiu mondfama inventisto, kiu havis kroatajn radikojn. Jam tiam ni decidis kompletigi sciojn pri Tesla per interparolo de nia ĉefredaktoro kun s-ro **Boško Budisavljević**, pranevo de la inventisto. S-ro Budisavljević kaj nia ĉefredaktoro amikas jam pli ol duonjarcenton. Ilin ligas multaj komunaj travivaĵoj, de skiado en Slovenio dum la unua duono de la pasinta jarcento, ĝis la renkontiĝo en la montaroj de Hercegovino en la dua duono de la pasinta jarcento. La amikeco pludaŭras ĉe bierkruĉoj. Dum unu el tiaj renkontiĝoj, s-ro Budisavljević demandis: Nu, ĉu finfine mi ricevos la demandojn por la intervjuo, aŭ la afero finiĝos kiel nia planita komuna grimrado en la regiono de Lika, la devenregiono de la grandulo Tesla, de niaj parencoj, kaj ankaŭ via regiono laŭ la bogepatra linio? Jen do, finfine, kelkaj demandoj!

**ZE:** Estimata sinjoro Budisavljević, ĉu vi povas klarigi al ni viajn parencajn rilatojn kun la granda monda inventisto Nikola Tesla, kiu naskiĝis en Kroatio?

- Nikola Tesla havis du fratinojn. Unu el ili, **Angelina Tesla**, edziniĝis al la ortodoksa pastro **Jovan Trbojević** el Lika. Ili vivis en la vilaĝo **Metak** apud **Gospić**, en la loko kie nuntempe troviĝas preĝejo. La domo en kiu ili loĝis ne plu ekzistas, sed mi ne scias kiam ĝi estis malkonstruita, kvankam mi konas la precizan lokon kie ĝi staris.

**Jovan** kaj **Angelina** havis kvar infanojn: la filojn **Uroš** kaj **Nikola**, kaj la filinojn **Marica** kaj **Milica**. Unu el la filinoj, **Marica Trbojević**, edziniĝis al la bienulo **Nikola Janković** el **Kistanje**. Ankaŭ ili havis kvar infanojn: du filojn kaj du filinojn. La filino **Danica** edziniĝis al la zagreba juristo **Adam Budisavljević**, kaj el tiu geedzeco naskiĝis ilia filo **Boško - Božidar**, respektive mi.

**ZE:** Ĉu vi scias ĉu Nikola Tesla krom via familio, havas aliajn parencojn vivantajn en Kroatio?

- Jes, li havas. Kaj en Kroatio kaj en Usono. En Kroatio vivas la infanoj de la fratino de mia patrino, kiu edziniĝis al inĝeniero **Miljenko Nadinić** el **Šibenik**. Iliaj infanoj nomiĝas **Milica** kaj **Simo**. En Usono ankoraŭ vivas **William Terbo**, la filo de **Nikola Trbojević**, kiu estis filo de **Angelina Trbojević** (la fratino de **Nikola Tesla**). Ĉiuj infanoj de **Angelina Trbojević-Tesla** doktoriĝis en diversaj fakoj, krom mia avino **Marica**. **Nikola** finstudis fizikon, se mi bone memoras - en Prago - kaj post tio foriris al Usono, sekvante sian onklon **Nikola Tesla**. **Nikola Trbojević** ankaŭ estis esploristo kaj inventisto, same kiel lia filo **William Terbo** (kiu mallongigis la familian nomon por esti pli facile prononcebla en Usono). **William Terbo** nuntempe estas plenumsekretario de "Tesla Memorial Society" en **New Jersey**, kiun li mem fondis en 1979.

**ZE:** Ĉu via familio dum la Dua mondmilito havis kontaktojn kun sinjoro Tesla?

- Rektajn kontaktojn ni ne havis, sed malrektajn ni havis pere de doktorino **Milica Trbojević** (unu el la filinoj de **Angelina**), kiu vivis kun **Sava Kosanović**, la filo de la dua fratino de Tesla. **Sava Kosanović** estis politikisto en la



La ĉefredaktoro de "Zagreba Esperantisto" kaj s-ro Budisavljević montras gazetaĵojn kun la artikoloj pri siaj filoj.

Reĝlando Jugoslavio, membro de la reĝa registaro fuĝinta antaŭ la atako de la Germanoj kontraŭ la Reĝlando Jugoslavio. **Sava Kosanović** post la Dua mondmilito estis ambasadoro de Federacia Popola Respubliko Jugoslavio en Usono. Post la morto de **Tesla** li heredis liajn aĵojn, ĉar li estis lia plej proksima parenco, kaj li alportis ilin en la tiaman Jugoslavion, kaj fondis **Muzeon de Nikola Tesla** en **Beogrado**, kiu estis la legacio de **Sava Kosanović** kaj **Milica Trbojević**.

**ZE:** *Ĉu nun vi havas kontaktojn kun liaj, respektive viaj parencoj en Kroatio?*

- Ne, mi ne havas apartajn kontaktojn kun la parencoj en Kroatio, sed kun **William Terbo** konatiĝis mia patrino dum lia restado en Jugoslavio, kaj dum lia vizito al **Smiljan**, la naskiĝvilaĝo de **Tesla**.

**ZE:** *Tesla plurfoje parolis pri grandenergiaj radioj, per kiuj li povas neniigi malproksimajn objektojn, senkonsidere pri ilia protekto. Por ŝargado de unuopa generatoro de tiaj radioj estus bezonata ordinara 30-volta baterio. Pri la "mortigaj radioj" Tesla komencis eksperimenti ankoraŭ en 1899, kaj komence de la Dua mondmilito li publikigis praktikan uzeblecon de sia inventaĵo, per kiu li haltigus la nazian invadon de la mondo. Sed, la radiojn neniu iam ajn vidis, nek ripetis la eksperimentojn de Tesla, kaj laŭ la legendo, Tesla mem, terurigita per le eblecoj de sia inventaĵo, malmultis sian maŝinon je tri partoj, kaj sendis ilin al ti mondfankoj, por ke ilin ne ekposedu malĝustaj personoj. Kion vi scias pri la "mortigaj radioj" de Tesla, kiuj preskaŭ plenan jarcenton provokas scivolemon de sciencistoj, sed pri ilia ekzisto ne troveblas findataj pruvoj.*

- Pri tiuj radioj mi scias

nenion pli ol estas jam publikigita en la gazetaro.

**ZE:** *Ĉu vi scias ke Tesla intencis konservi la antaŭan Jugoslavion kontraŭ militaj detruoj?*

- En la familia kolekto ni havas la telegramon de **Tesla**, senditan al **Sava Kosanović**. En tiu telegramo **Nikola Tesla** informas **Savan Kosanović**, sian nevon, ke li inventis sistemon, per kiu Jugoslavio povos defendi sin kontraŭ aeratakoj. Plue en la telegramo li petas sian nevon, ke li sendu al li 800 dolarojn, por ke li povu daŭrigi la esplorojn. Onidire, ekzistas pluraj tiaj telegramoj de **Tesla**, sed pri la ekzisto de tiu ĉi, mi estas certa.

**ZE:** *Ĉu vi scias kio okazis, post la morto de Tesla, kun lia privata havaĵo kaj kun la inventoj, ĉar la dokumentoj kaj projektoj estis sigelitaj, kaj ĉar oni opinias, ke ilin intense esploris almenaŭ kelkaj usonaj sekretaj servoj, kiuj ankaŭ kaŝis ilin?*

- Je tiu dmeando mi respondis jam pli frue en ĉi tiu intervjuo. Mi ripetos: La aĵoj de **Tesla**, kiujn heredis **Sava Kosanović**, estis alportitaj al Jugoslavio, kaj estis fondita la **Muzeo de Nikola Tesla**. Ankaŭ la urno kun la cindro de **Tesla** tiufoje estis alportita, kaj nuntempe ĝi troviĝas en la Muzeo. Rilate la rakontojn pri sekretaj servoj kaj fotado de la dokumentoj de **Tesla** post lia morto, mi scias nur el la gazetaro.

**ZE:** *Tesla intense laboris pri la sendrata transmisio de elektra energio, kaj lia invento de nevidebleco estas prezentita en la filmo "Philadelphia Experiment". Tiu eksperimento, onidire, okazis komence de la Dua mondmilito,*

*kiam por kelkaj minutoj malaperis la usona miltŝipo "Eldridge", sed Tesla mem rifuzis plue okupiĝi pri ĝi. Ĉu vi scias ion pri tio, aŭ havas ian leteron aŭ dokumenton?*

- Nenion mi scias pri tio.

**ZE:** *Estus interese komenti la ĉeson de la kunlaboro inter Tesla kaj Morgan.*

- Tiun historion mi konas el filmoj kaj tekstoj pri **Tesla**, do mi scias nenion ĝis nun nesciitan. Onidire, **J. P. Morgan**, la konata bankisto de tiu tempo (mi pensas ke lia banko ankoraŭ ekzistas), demandis sian afergvidanton, taskigitan kontroladi la uzadon de financoj kiujn **Morgan** aprobis por la eksperimentoj de **Tesla**, kion **Tesla** faras. La afergvidanto respondis ke **Tesla** okupiĝas pri la patento de senpaga transmisio de elektra energio, por ke ĉiuj homoj de la mondo povu uzi ĝin. **J. P. Morgan** ordonis, ke oni ĉesigu la financadon, ĉar oni ne povas investi en ion, el kio la banko ne havos financan utilon.

Aliaj historioj, tiun pri **Westinghouse**, unuafoje mi aŭdis de mia patrino. **Westinghouse** investis en la elektrajn centralojn de **Tesla**, kaj laŭ la kontrakto li devis pagadi al **Tesla** tantiemojn je kilovat-horo de produktita elektro. Kiam **Westinghouse** komprenis pri kiaj sumoj temas, li petis **Teslan** ŝanĝi la procentaĵon, ĉar cetero li bankrotos. **Tesla** prenis la kontrakton kaj disŝiris ĝin, demandinte al **Westinghouse**: "Ĉu tio sufiĉas?". Tion oni ne devas komenti, ĉar nuntempaj cerboj, ŝarĝitaj per globaligo kaj rapida riĉiĝo, laŭ sia pensmaniero entute ne povas kompreni, ke iu "stultulo" povis rifuzi la gajnon, senkonsidere ke tiu gajno bankrotigus iun alian.

En Zagrebo,  
la 16-an de aprilo 2014



## 70-a datreveno de surgrimpo sur Akonkagvo

neĝo. Fine, antaŭ la mateniĝo ni komencis la grimpadon al la pinto. La maldensa aero ne havis sufiĉe da oksigeno. Forta vento blovis kaj ni frostis malgraŭ la gantoj kaj jako. Iom post iom nia grupo malkreskis, ĉar iuj cedis kaj revenis al la kampadejo. El nia dekdu-persona teamo nur kvar atingis la supron, sed ĉiuj suferoj estis forgesitaj kiam ni staris alte super ĉio. Malproksime oni povis klare vidi la alian montegon – **Akonkagvo**. Dum la sekvaj tagoj la teamo descendis kaj revenis al **Mendoza** por la revenflugo al **Israelo**. Sed mi ankoraŭ ne plenumis mian ĉefan celon, kiu por mi ne estis nur plia pinto. En mia sako mi portis malnovan libron “*Tempesto super Akonkagvo*” verkita de la konata vojaĝanto **Tibor Sekelj**, kiu atingis la pinton de **Akonkagvo** la 13-an de februaro 1944, antaŭ

# EN LA SPUROJ DE TIBOR SEKELJ: DE KILIMANĜARO AL AKONKAGVO

*Amri Wandel*

Mia vojaĝo al la pinto de **Andoj** efektive komenciĝis sur alia pinto, en alia kontinento – **Kilimanĝaro**, la plej alta monto de Afriko. Dum la unusemajna grimpadado la pejzaĝo rave ŝanĝiĝis kun la alteco – de tropika praarbaro ĝis glaĉeroj. Fine ni atingis la pinton je alteco de 5900 metroj. Sur la pinto mi surbendigis saluton en Esperanto (<https://www.youtube.com/watch?v=F2mQYUAY7vg>), pensante ke mi estas la unua esperantisto sur **Kilimanĝaro**, sed poste mi eksciis, ke **Tibor Sekelj** estis tie antaŭe. Lia aventuro-plena montgrimpa kariero komenciĝis sur alia monto, mil metrojn pli alta ol **Kilimanĝaro** – la plej alta en ambaŭ Amerikoj: **Akonkagvo**. Mi decidis ke iam mi atingos ankaŭ ĝin. Post du jaroj kaj monatoj de preparado efektiviĝis mia revo. Nia teamo atingis la argentinan urbon **Mendoza**, la bazon por la

grimpadado. Sed ve, samtage pluvegoj kaŭzis vastajn ter-lavangojn, kiuj blokis la vojon al **Akonkagvo**, onidire por almenaŭ du semajnoj. Ĉar nia tempo estis limigita, la teamo decidis anstataŭe grimpi alian monton – **La Plata**, je alteco de “nur” 6000 metroj. Tamen, ankaŭ tio estis malfacila tasko, postulanta preskaŭ semajnon kaj duono pro la neceso adaptiĝi al la alteco. Je alteco de 4600 metroj nia tendaro estis kovrita per dika tavolo de

sepdek jaroj. Mi planis sekvi la vojon priskribitan en la libro laŭ la spuroj de **Sekelj**. Intertempe la vojo al **Akonkagvo** estis denove malfermita kaj mi decidis plilongigi la restadon en **Argentino** por realigi tiun celon. Kune kun alia teamano kaj unu el niaj lokaj gvidantoj mi ekis al **Akonkagvo**. Ni ne havis multan tempon (unu semajnon anstataŭ la normale bezonata tempo de 2-3 semajnoj). Tamen, ni jam estis al kutimiĝintaj al la alteco kaj





progresis pli rapide ol ordinaraĵoj grupoj. La grimpadado komenciĝas ĉe loko nomata **"Ponto de la Inkaoj"** – fascina geologia fenomeno. Tie iam funkciis hotelo (nun fermita), en kiu la grupo de **Sekelj** gastis antaŭ la grimpadado. Kelkajn kilometrojn pli poste ni atingis la pordegon de la regiona parko **Akonkagvo**, kie oni devis stampi la grimpad-permesilon. Tie la unuan fojon oni vidas la blankan pinton de la "ŝtona gardisto" (tio estas la signifo de la nomo **Akonkagvo** en la indiĝena lingvo). De ĉi tie, promesas signo, post 25 kilometroj kaj 1500 metroj de grimpadado laŭlonge de la valo de **Horkones** oni atingas la bazotendaron **"Placo de muloj"** je alteco de 4300 metroj. Tiun vojon oni kutime faras en 3-4 tagoj, kaj tiom ankaŭ bezonis la grupo de **Sekelj**, sed ni kompletigis ĝin dum nur unu longa kaj streĉa tago. Marŝante laŭlonge de la **Horkones-rivero**, la pejzaĝo ŝanĝiĝis de arbustoj kaj herbo-kovrita pampo (albebenajo de Andoj) al nudaj ventego-batitaj rokoj. Ni pasis la haltejojn **"Kunfluejo"** kaj **"Granda ŝtono"**, kie la **Sekelj**-grupo tranoktis. Vespere ni alvenis lacegaj al la bazo-tendaro **"Placo de muloj"** kaj aliĝis al grupo de grimpantoj por vespermanĝo en la manĝeja tendo. Ili rakontis, ke dum la lastaj tagoj tro forta vento malebligis atingi la pinton, kaj du personoj pereis. La postan tagon ni devis resti en la bazkampadejo por alkitimiĝi. **Sekelj** rakontas pri la vivo en **"Placo de muloj"** kiu estis malplena kaj forlasita kiam ilia grupo atingis ĝin kaj ili multe laboris por starigi tendojn kaj krei taŭgajn vivkondiĉojn. Li ankaŭ faris plurajn tag-ekskursojn al apudaj pintoj – **Katedralo** kaj **Korno**, kiujn mi klare vidis de la bazkampadejo. Ankaŭ mi utiligis la ripoztagon por esplori la ĉirkaŭaĵon. Post la sunsubiro ni rigardis la noktan ĉielon. La klareco kaj la nombro de steloj estis mirinda. Ni vidis la **Sudan Krucon** kaj la **Laktan Vojon** kun la du malgrandaj **Nuboj de Magelano**, kiuj ne estas videblaj en la norda hemisfero.

La sekvan tagon ni decidis plu grimpi. Kutime, se la vetero estas bona, eblas atingi la pinton de la bazkampadejo dum 4-5 tagoj, tranoktante en kampadejoj iom post

iom pli altaj. La unua super **"Placo de muloj"** nomiĝas **"Kanado"**, je alteco de 5000 metroj. La sekva – **"Agla nesto"** je 5400 metroj, kaj supra, de kiu oni ofte provas grimpi al la pinto, nomiĝas **"Ĥolero"** je alteco de 5900 metroj. En la libro **Sekelj** rakontas, ke ili konstruis tie kabaneton kaj nomis ĝin **"Rifuĝejo Link"** je la nomo de la grupgvidanto. En tiu alteco la vento povas atingi rapidojn de cent kilometroj hore. La aero estas tiel maldensa, ke ĉiu paŝo fariĝas peza tasko, precipe kun ŝarĝo de 20 kilogramoj sur la dorso. La temperaturo en nia tendo dum la nokto atingis minus 15 gradoj kaj la akvo en niaj boteloj glaciĝis. Por havi akvon, matene ni devis degeligi neĝon. La pejzaĝo fariĝis pli kaj pli mirinda. Ni grimpis pli alten ol la ĉirkaŭa montaro. Tamen la veterprognozo malboniĝis kaj rezervejaj gardistoj avertis, ke en la proksimaj tagoj la vento estos tro forta por atingi la pinton, kaj eĉ la restado en la altaj tendumejoj estos danĝera. Ni decidis iri malsupren al **"Placo de muloj"** kaj tie atendi la sekvan eblecon atingi la pinton. La descendo estis facila kaj surprize rapida, kompare kun la pena grimpadado. Atendante, mi decidis esplori unu el la plej fascinaj lokoj priskribitaj en la libro de **Sekelj**: la "glaciturojn", kiujn la lokanoj nomas **"Penitentes"**. Ili troviĝas en la glaĉero **"Supra Horkones"**, kelkcent metrojn super la bazotendaro. La unika vetero de tiu loko, kombino de forta vento kaj suna degelado, kreis glacio-kolonojn 2-3 metrojn altajn. En antaŭaj jaroj la glaĉero atingis ĝis **"Placo de Muloj"** kaj eĉ pli sube, sed pro la tutmonda degeliĝo de glaĉeroj ĝi retiriĝis, kaj nuntempe oni bezonas marŝi de la bazkampadejo pli ol unu horon, grimpante la morenon. Sur la glaĉero oni devas atenti por ne fali en la **"krevesojn"** – profundajn fendojn, kiuj okazas pro la moviĝo de la glaĉero. Stranga kaj magia mondo de glacio, kolonoj en multnombraj formoj, glacio-kavernoj, glaci-fungoj kaj lagoj. Tiun lokon mi decidis elekti kiel fonon por vidbendigi saluton al



Esperantujo, preskaŭ 70 jarojn post la grimpadado de **Tibor Sekelj** kaj unu jaron antaŭ la 99-a UK. Vidu ĝin en <https://www.youtube.com/watch?v=GNxyoPktTk>

Intertempe la veterprognozo ankoraŭ pli malboniĝis, kaj oni antaŭvidis ŝtormon, kiu daŭrus tutan semajnon. Ĉar ni ne povis atendi tiom longe, ni decidis cedi kaj adiaŭi la montaron, kiu fariĝis nia hejmo dum preskaŭ tri semajnoj. En la sekva tago ni komencis la longan vojaĝon malsupren en la valon **Horkones**. Vespere ni atingis la pordegon de la rezervejo kaj veturis reen al la civilizacio – al la urbo **Mendoza** kaj plu aviadile al **Bonaero**. En la flughaveno mi ĝojis renkonti esperantistojn, kiuj venis akcepti nin. En la sekva tago ni kune ekskursis en **Bonaero**. Mi vizitis la Esperanto-klubon kaj rakontis pri nia travivaĵo. Kelkaj membroj ankoraŭ memoris **Tibor Sekelj**. Oni petis min subskribi la gastlibron de la klubo (garditan kiel trezoro dum pli ol 70 jaroj). En la libro mi trovis la subskribon de **Tibor Sekelj** dum lia lasta vizito al **Bonaero** en 1977. Poste mi vizitis la lokon kie okazis la atenco kontrŭ la juda komunuma centro en 1999. Estis elekto-tago kaj en la radio estis dissendita parolado de la argentina prezidentino **Ŝtajner**. Aviadilo portis min reen al Israelo, nia eta hejmlando, kie la problemoj pli altas ol la montoj.

# VROCLAVO KANTAS ESPERANTAJN KANTOJN

 *Malgosia Komarnicka*

La 23-an de majo 2014 en **Vroclavo** (Pollando/ Malsupra Silezio) okazis nova grava evento kune preparita de esperantistoj (la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo) kaj neesperantistoj (la Elementa Lernejo n-ro 9 en Vroclavo). Temas pri la **DUA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ**. Ĉi-jare ĝi okazis sub patronadoj de **Mila van der Horst Kolińska**, konata esperantistino, honora membro de UEA kaj ILEI, kaj de la senatano de Pola Respubliko prof. **Edmund Wittbrodt**, iam ministro pri klerigado en la registaro de Jerzy Buzek, kaj nun prezidanto de la Senata Kolegio por Subtenado de Esperanto kaj ankaŭ Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

La festivalo estos okazigata ĉiujare, ĉiun trian vendredon de majo, en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto.

La publikon kaj la partoprenantojn en la salonego belege ornamita fare de la lernejaj instruistinoj, salutis la direktorino de la lernejo s-ino **Anna Szanin** kaj la kunordigantino de la evento la direktorino de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo **Malgosia Komarnicka**, kiu gvidis la festivalon. Komencante ĉi tiun belan eventon, unue la tuta publiko kune kantis la Eŭropan Himnon en la lingvo Esperanto kaj poste **Malgosia Komarnicka** tralegis salutleterojn de la patronoj.

Ĉi-jara festivalo havis rimarkeble pli altan nivelon ol pasintjara kaj la ĵurio havis malfacilan tasko por aljuĝi premiojn. Dum interkonsiliĝo de la ĵurio, **Helena Biskup** deklamis pole

kaj Esperante popularajn versaĵojn kaj **Bogdan Dembiec** sukcese instruis la neesperantan publikon, kanzoneton en la lingvo Esperanto "Hundo estas bona besto".

Post longa diskuto la ĵurio en la kategorio "solisto" aljuĝis tri premiojn. Ricevis ilin: **Kamila Jasionowicz** el Złotoryja (la unua premio), **Tobiasz Kubisiowski** el Krakovo (la dua premio) kaj **Bogusia Nowak** el Nadolice Małe (la tria premio). En la kategorio "koruso aŭ ensemblo" la ĵurio decidis aljuĝi nur du premiojn. Ilin ricevis la ensemblo "**Cicha woda**" el Vroclavo (la unua premio) kaj dueto "**Julia i Lucja**" el Vroclavo (la dua premio). La ĵurio, kiu konsistis el du geesperantistoj, **Ala Brodala** kaj **Zdzisław Koczarski** kaj unu neesperantistino **Marta Suchta**, pritaksis ne nur muzikajn, sed ankaŭ lingvajn valorojn.

Ĉiuj ĉeestantoj ricevis diplomon, kaj la premiitoj, diplomon, pokalon kaj donacopremion. Diplomoj estis disdonitaj ankaŭ al instruistoj, kiuj motivigis

kaj preparis siajn lernantojn partopreni la festivalon.

La plenumantoj kaj iliaj instruistoj aŭ gepatroj, kiuj motivigis, preparis kaj akompanis la junajn kantantojn estis invitataj je bongusta manĝaĵo dum kiu oni jam iomete preparolis venontjaran festivalon.

Ĉiuj ĉeestantoj revenis hejmen tre kontentaj, promesante plivastigi sian repertuaron de Esperantaj kantoj. Ili certe estos bonaj ambasadoroj de Esperanto des pli, ke jaŭde, la 29-an de majo estis profesia surdiskigo de la premiitaj kantoj.

Sumigante la ĉi-jaran Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj la organizantoj konstatis, ke bela surprizo estis granda intereso de neesperanta medio por prezenti Esperantajn kantojn, kies vortojn oni devus speciale ellerni. La organizantoj kun bedaŭro konstatis, ke la Esperanto-medion reprezentis nur unu esperantisto...

La sekva festivalo okazos la 22-an de majo 2015, kaj ni jam nun invitas esperantistojn ĉeesti ĝin.



# FERVOJISTOJ EN SAN BENEDETTO DEL TRONTO

*Zlatko Hinšt*

Inter la 17-a kaj la 24-a de majo 2014 okazis la 66-a kongreso de la Internacia Fervojoista Esperanto-Asocio (IFEF) en **San Benedetto del Tronto**. La urbo troviĝas ĉe la itala adriatika marbordo inter **Ankono** kaj **Peskaro** en la regio **Markio** (itale: Marche). El Kroatio la kongreson partoprenis du personoj. Okaze de la malfermo, dimanĉon la 25-an de majo, salutparolis reprezentantoj de la urbo kaj regiono (prezidanto de la Provinca Komerca Konfederacio **Fausto Calabresi**), prezidantino de IFEF **Rodica Todor**, ĝia honora prezidanto **d-ro Romano Bolognesi**, je la nomo de la LKK kaj kiel sekretario de IFEF **Vito Tornillo**, je la nomo de Itala Esperanto-Federacio ĝia vicprezidanto **d-ro Renato Corsetti** kaj reprezentantino de UEA. Inter reprezentantoj de landaj asocioj de IFEF, je la nomo de Kroata Fervojoista Esperanto-Asocio (KFEA) la kongreson salutis **Zlatko Hinšt**. Post la salutoj okazis prelego de **Thierry Saladin** "Kia ni rigardu tiun internacian peticion – Esperanto, oficiala lingvo de la Eŭropa Unio, nun!", post kiu sekvis interesa urbovizitado de San Benedetto del Tronto.

Dum la kongreso okazis la t.n. Nepublika komitatkunsido kaj publika IFEF-Plenkunsido (jarkunveno). Aprobataj estis: raporto pri bilanco por 2013, buĝeto por la jaro 2015 kaj laborplano de IFEF por sekvontaj jaroj surbaze de strategio de UEA. Precipe gravas mencii fondon de komisionoj pri statuto de IFEF, ĝia historia heredaĵo kaj financado de projektoj surbaze de eŭropuniaj fondusoj. Post la oficiala parto prezentis sin la venonta kongreso, okazonta en 2015 en **Kunming** (sudokcidenta Ĉinio).



En la programero "Movadaj aferoj" oni diskutis pri aktuala situacio de la Esperanto-movado.

La laboro de la *Faka Komisiono* (gvidata de **Jan Niemann**) ampleksas la *Fake Aplikan Sekcion*, kiun gvidas inĝeniero **Ladislav Kovač** kaj *Terminaran Sekcion*, kiun gvidas **d-ro Heinz Hoffmann**. La *Fake Aplika Sekcio* prezentas fakprelegojn kaj novaĵojn, kaj la *Terminara* diskutojn pri fervojaj fakterminoj. La kongresorganizanto **Vito Tornillo** prezentis du ĉefajn prelegojn: "La nodo de AV (grandrapida trafiko) de Bologna kaj rekvalifikado de la stacidomo" kaj "La nova itala motorvagonaro Frecciarossa ETR1000 por grandrapidaj trajnoj". Sekvis aliaj prelegoj pri diversaj temoj. **D-ro Zlatko Hinšt** prelegis pri "Trafika efikeco de fervojoj en Eŭropo kaj en la mondo – ekzemplo de la jaro 2012".

Dum la kongreso estis organizita altkvalita muzika programo. La itala kantisto **Emanuele Rovere** faris Esperantajn tradukojn de konataj italaj kanzonoj kaj aliaj kantoj, kiujn li mem kantis por la kongresanoj. Kun propra akompano de gitaro kantis konatajn kanzonojn kaj teatrajn kantojn profesoro de muziko **Maria**

**Grazia Barboni**. Bona kaj amuza estis muzikvespero de **Sergio Napoletani Band** kun dancgrupo. Estis organizita ankaŭ loka itala folkloro vespero. Laŭdindas la organizantoj pro la bonkvalitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, precipe pro la bongustaj italaj vinoj kaj specialaĵoj. Oni devas akcenti ankaŭ amikan etoson inter la partoprenintoj kaj la gastamon de la organizantoj. La kongreso estis bona maniero por reklamado de itala turismo. La bone organizita kongreso kunvenigis 130 partoprenantojn.

Dum la tuttaga ekskurso la kongresanoj vizitis historiajn urbetojn kaj vidindaĵojn **Loreto** (pilgrimejo), **Recanati** (muzeo), **Castelfidardo** kaj **Taktilan Ŝtatan Muzeon "Omero"** (dediĉitan al la blinda greka poeto Homero). Okazis ankaŭ duontagaj ekskursoj al urbetoj **Ascoli Piceno**, **Ripatransone** kaj **Offida**. Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio **Aldo Grassini** kun multe da detaloj en sia prelego prezentis la regionon de **Markio** kaj estis bona ĉiĉerono, kvankam li estas nevidanta persono.

La kongreson sekvis la postkongreso dediĉita al naturbelaĵoj kaj kulturartaj vidindaĵoj de tiu parto de Italio: **Frasassi Kavernoj** kaj urbetoj **Civitella del Tronto**, **Grottammare** kaj **Fermo**.

# PREZOJ DE PASAĜERA TRANSPORTO EN KROATIO\*

 Zlatko Hinšt

## Enkonduko

En ĉi tiu artikolo la aŭtoro prezentas sian prelegon (kiel analizojn per tabeloj kaj grafikaĵoj) dum la 65-a Internacia Fervojiŝta Kongreso, okazinta de la 4-a ĝis 11-a de majo 2013 en Artigues-près-Bordeaux. La celo de la artikolo estas mallonge prezenti la enhavon de la prelego laŭ ĝiaj partoj, kun akcento al formo de tabeloj kaj grafikaĵoj aperintaj en raportoj kaj planoj de kompanioj de Kroataj Fervojoj (HŽ-Hrvatske željeznice), kiaj estis HŽ-Pasaĝera transporto d.o.o. kaj HŽ-Ĥoldingo d.o.o. (ĉi-lasto ne plu ekzistas ekde la 1-a de novembro 2012) por elektitaj jaroj. La menciitaj partoj de analizrezultoj fontas el originalaj formoj troviĝantaj en diversspecaj raportoj kaj planoj. Ĉiuj tabeloj kaj grafikaĵoj enhavas prezojn de pasaĝera transporto en Kroatio, en la fervoja, ŝosea kaj aera trafiko en diversaj formoj: kiel regulaj tarifoj en la enlanda kaj internacia transportoj, rabatitaj prezoj kiel specialaj ofertoj, inkluzive diversformajn prezojn en internacia transporto.

La analizoj enhavas averaĝajn prezojn kiel rilatojn inter kvanto de transportitaj pasaĝeroj kaj trapasitaj kilometroj, kaj realigitajn enspezojn, inkluzive rilatojn inter ŝanĝo-procentoj de iliaj elementoj rilatantaj kiel koeficientoj de elasteco. Inkluzivitaj estas ankaŭ kostoj de persona aŭtomobilo, kalkulataj por du kaj kvar personoj. Krom tio la analizoj

enhavas vetur-tempojn de trajnoj kaj busoj laŭ difinitaj distancoj (de Zagrebo al aliaj urboj). Ekzistas ankaŭ trarigardo de elementoj de transportitaj pasaĝeroj laŭ speco de rabatitaj vojaĝbiletoj.

## Enhavo de tabeloj kaj grafikaĵoj

Unue prezentita estas la tabelo pri prezoj (esprimitaj en kunaĵoj) de la fervoja kaj ŝosea pasaĝer-transporto en Kroatio, je la ekzemplo de 13 diversaj distancoj inter la ĉefurbo Zagrebo (el la *Ĉefa fervoja stacidomo* kaj *Aŭtobusa stacidomo* de Zagrebo) kaj la urboj Karlovac, Koprivnica, Varaždin, Virovitica, Slavonski Brod, Gospić, Rijeka, Vinkovci, Osijek, Knin, Pula, Zadar kaj Split (kies distancoj varias inter 53 kaj 423 kilometroj), komparante regulajn prezojn por la dua kaj unua klaso kaj kelkajn specialajn ofertojn de pasaĝeraj, rapidaj, InterCity (IC) kaj ICN (IC trajnoj kun kliniĝtekniko) kun aŭtobusoj, faritaj per indicoj. La grafikaĵo kun komparoj por la menciitaj 13 distancrilatoj pri prezoj de la dua klaso de rapidtrajnoj kaj aŭtobusoj, evidente montras diferencojn. La fonto de bazaj datumoj por ĉi tiu parto de la analizo estas *Tarifo pri transporto de pasaĝeroj en la enlanda transporto – Prezaro – Tarifo 103*, eldonita de la kompanio HŽ-Pasaĝera transporto d.o.o., validintaj de la 1-a de julio 2009; informoj pri specialaj ofertoj *"Jaraj valoras pli"* (rabato

por 60-jaruloj kaj pli aĝaj personoj) kaj *"Indekso valoras pli"* (rabato por studentoj), ambaŭ uzebblaj ekster somera sezono, kaj informoj de *Aŭtobusa stacidomo de Zagrebo* el la retejo <http://www.akz.hr> (sub Horaro – pri prezoj). La du lastaj prezo-specoj rilatas al marto 2012.

Due prezentita estas la tabelo pri prezoj de trajnvojaĝo en la dua kaj unua klaso de ICN kaj rapidaj trajnoj kun litvagonoj en kategorioj de servoj por *"touriste"*, *"double"* kaj *"single"*, kaj la listo de 8 niveloj de aviadilaj prezoj por la vojaĝo de Zagrebo al Split. La unua fonto de tiuj prezoj estas la jam menciita *Tarifo 103* kaj la dua fonto troviĝas en la informoj de respektiva oficejo de aertrafika kompanio *"Croatia Airlines"*. Sub la tabelo estas eksplikita la maniero de prez-formado por koncernaj servoj en litvagonoj. Sekvas du komplementaj grafikaĵoj: la unua por unuopaj prezoj, kun diversaj kazoj de aviadilaj prezoj, kaj la dua kun averaĝaj prezoj por trajnoj, aŭtobuso kaj aviadilo.

La tria tabelo estas komparo de regulaj prezoj por diversaj trajnoj (pasaĝeraj, rapidaj, IC kaj ICN por la dua kaj unua klaso) kaj aŭtobusoj, kun kostoj de persona aŭtomobilo por transporto de du kaj kvar personoj de Zagrebo al la menciitaj 13 kroataj urboj. Ĉi tiuj kostoj estis kalkulitaj surbaze de sumaj kostoj de fuelkonsumo (8 litroj de dizela fuelo por 100 kilometroj), amortizo (10% de aĉetprezo de aŭtomobilo), supozitaj riparoj, asekuro ktp. Ĉio rilatas la

\* Originala titolo de la artikolo de d-ro Hinšt estas: PREZOJ EN TABELOJ KAJ GRAFIKAĴOJ - EN RAPORTADO DE KROATAJ FERVOJOJ - Prezoj de pasaĝera transporto en Kroatio

prezojn kaj kostojn, validintajn kaj determinitajn en 2008. En kelkaj kazoj, en la prezojn estas inkluzivitaj aŭtoŝoseaj kompensoj por aldonaj komparoj. La grafikaĵo klare montras la rilatojn de la menciitaj prezoj kaj kostoj.

La kvara estas tabelo pri prezoj (esperimitaj en eŭroj) de fervoja, ŝosea kaj aera trafiko por pasaĝeroj en internacia transporto, validintaj en (marto de) 2012. Pli precize, ĝi rilatas komparon inter la regulaj prezoj de la dua klaso de rapidtrajnoj kaj specialaj ofertoj de trajnoj, aŭtobusoj kaj aviadiloj kun la regulaj prezoj kaj specialaj ofertoj (malaltnivelaj prezoj) por 12 vojaĝceloj en Eŭropo: de Zagrebo al Budapeŝto, Vieno, Prago, Sofio, Munkeno, Berlino, Frankfurto, Stutgarto, Hanovro, Zuriko, Banja-Luko kaj Sarajevo. La rilatojn inter prezoj plej bone prezentas indicoj laŭ unuopaj trafikaj rimedoj. La menciitaj prezoj fontas el la *Komunaj internaciaj tarifoj*, eldonitaj de Kroataj Fervojoj (HŽ) por trajnhoraro 2011/2012, validinta ekde la 11-a de decembro 2011: tarifoj NRT 123, 140, 141, 142 kaj 143; retejoj de *Aŭtobusa stacidomo Zagreb*, "*Croatia Airlines*" kaj vojaĝagentejoj. Sub la tabelo ekzistas ekzemploj de koncernaj prezoj en kunaĵoj ricevita de vojaĝagentejoj "*Croatia-Express*" kaj "*Spektar*". Sekvas grafikaĵo montranta rilatojn inter la menciitaj prezoj.

Sekvas la kvina, sesa kaj sepa tabeloj pri prezoj (esprimitaj en eŭroj) de internaciaj biletoj InterRail (IR) por diversa nombro da tagoj, enkadre de limdato por la dua kaj unua klaso en kategorioj "IR Global Pass Flexi" kaj "IR GP Continuous" por plenkreskuloj, personoj pli aĝaj ol 60-jaraj, junuloj ĝis 26-jaraj kaj infanoj, kaj pri prezoj de la dua klaso, aparte por plenkreskuloj kaj aparte por junuloj, depende de uzado de iu el la kvin prezaj niveloj, lando kaj vojaĝnombro

en 3, 4, 6 kaj 8 tagoj ene de unu monato. La fonto por tiuj tabeloj estas la tarifoj kaj informoj por la horaro 2011/2012. Estis prezentitaj ankaŭ kelkaj prezoj el la speciala oferta por la trajno EuroNight (EN), veturanta inter Zagrebo kaj aliaj urboj, kiel dislimigo de prezoj en la relvoja linio Zagrebo-Vinkovci kaj Munkeno, inkluzive la prezojn de SparNight.

La oka tabelo temas pri averaĝaj prezoj (esperimitaj en kunaĵoj), kalkulitaj surbaze de transportaj enspezoj po pasaĝerkilometro je la totala nivelo de transporto, enkadre de kiu estas notita la enlanda kiel loka (kurtdistanca) kaj longdistanca, apudurba kaj internacia transporto por la jaroj 2009, 2010 kaj 2011. Sekvas respektiva grafikaĵo kun averaĝaj prezoj por la periodo 2006-2011. Post ĝi aperas du tabeloj – la naŭa pri kvanto-ŝanĝo de transporto kaj averaĝaj prezoj rilatantaj kiel koeficiento de elasteco je ekzemplo de la jaroj 2010 kaj 2011, kaj la deka tabelo je periodo 2006-2011. La fontoj por tiuj tabeloj estas statistikoj de Kroataj Fervojoj (HŽ-Pasaĝera transporto d.o.o. kaj HŽ-Holdingo d.o.o.).

La dekdua (antaŭlasta) estas la tabelo pri nombro da trajn-kaj buslinioj kaj tempoj de veturado de Zagrebo al la jam menciitaj 13 urboj en Kroatio. Ili estas prezentitaj en minimumaj, maksimumaj kaj averaĝaj veturtempoj, esprimitaj en horoj kaj minutoj. La kalkuloj estas faritaj surbaze de (malgranda) trajnhoraro (libreto) de la *Ĉefa fervoja stacidomo* de Zagreb por 2003/2004 kaj *Aŭtobusa stacidomo* de Zagreb por la jaro 2004 (surbaze de informoj el koncerna retejo) kaj koncernas la jam elektitajn 13 kroatajn urbojn. Ĝin sekvas respektiva grafikaĵo klare montranta diferencojn inter trajnaj kaj busaj veturtempoj.

La dekdua tabelo estas la lasta, kaj ĝi rilatas la strukturon

de forsenditaj kaj transportitaj pasaĝeroj laŭ specoj de vojaĝbiletoj kaj rabatoj en la enlanda kaj internacia transportoj, esprimita en sumoj kaj procentoj je ekzemploj de la jaroj 2010 kaj 2011. Temas pri pasaĝeroj transportitaj surbaze de regulaj prezoj, revenbiletoj, monatj biletoj (lernantaj kaj laboristaj), junuloj, pensiuloj kaj maljunuloj, infanoj, invalidoj kun akompanantoj kaj fervojistoj. Plue temas por apudurba transporto en la enlanda trafiko, pri regulaj tarifoj kaj iuj specialaj ofertoj en la internacia transporto (City Star, SparNight). La fonto por tiu tabelo estas *Merkatiko, statistiko, Enspezkontrolo kaj Kontrolado* de HŽ-Pasaĝera transporto d.o.o.

## Konkludo

Surbaze de la prezentitaj datumoj en la tabeloj, kaj helpe de grafikaĵoj, oni povas fari adekvatajn konkludojn pri prezoj en la enlanda kaj internacia pasaĝera transporto en Kroatio, komparante fervojojn kun aliaj transportmanieroj. Tiucele plej gravas akcenti ke:

En la enlanda transporto regulaj bilet-prezoj por trajn-pasaĝeroj, ekzemple por la dua klaso de rapidtrajnoj, estas pli favoraj ol por bus-pasaĝeroj por plimulto el la konsideritaj distancoj. Precipe pli favoraj estas rabatitaj prezoj kaj specialaj ofertoj de *Kroataj fervojoj*, ebligantaj plimultigon de vojaĝoj por multe da pasaĝeroj, kion pruvas ankaŭ la datumoj. Trajnvojaĝo, rigardata el la preza aspekto, estas malpli kosta ol averaĝa regul-preza vojaĝo per aviadilo (en la distanco inter Zagrebo kaj Split), eĉ se ĝi estus komparata kun prezoj de litvagona transporto en ĝia "averaĝa" kategorio "*double*". Vojaĝo per trajno estas pli favora ankaŭ el aspekto de prezoj, se kompari ĝin kun sumaj kostoj de aŭtomobilo por du personoj, sed jam kostoj por kvar personoj

# LEGU LIBROJN KAJ VIA Vasil Kadifeli TUTA MONDO ŜANGÎĜOS!

Saluton. Ĉu vi iam ĝis nun aŭdis pri la **Sumoo Librolegado**?

Ĝi estas organizo de japana esperantisto **Hori Jasuo**. Li ĉiujn du monatojn organizas du-semajnan librolegadon, kies celo estas ke esperantistoj de la tuta mondo kune legu librojn sesfoje dum jaro, en la tempo kiam okazas ankaŭ la japanaj sumoo-luktadoj. La librolegado estas grava afero, kaj ĝi certe kontribuas al la Esperanto kulturo.

Se vi volas partopreni, vi unue decidus pri kiu libro vi legos, kaj poste pri la kvanto de paĝoj kiujn vi legos ĉiutage. Ne nepras legi la tutan libron, ĉar eble la tuta libro enhavas tro da paĝoj por vi por esti legita en 15 tagoj. Se vi estas komencanto, vi povas legi facilan libron, kaj vi eĉ povas promesi legi unu paĝon tage. Gravas partopreni kaj legi vian libron kune kun aliaj esperantistoj tutmonde.

La ĉefprizorganto **Hori Jasuo** transdonos al vi retroŝtadreson de iu esperantisto por ke vi raportu vian rezulton la 1-an, 3-an, 6-an, 9-an, 12-an kaj 15-an tagojn, sed ne nepre. Se vi legis la promesitan kvanton de paĝoj aŭ eĉ pli, vi markas tiun tagon per la venko simbolo "o", sed ne per la malvenko simbolo "x". Vi iasence luktas kontraŭ vi mem por legi la promesitan kvanton de paĝoj. Se vi venkis, post 15 tagoj vi gajnos diplomon.

Maldekstre estas mia diplomo ricevita fine de majo 2014 por Sumoo Librolegado.

Alia tre bona afero estas, ke en la retpaĝo de la Sumoo librolegado estas datumbazo pri legitaj libroj, kaj eĉ malgrandaj recenzoj pri ĉiu libro. La resumoj estas preparitaj de la legantoj.

En la maja 2014 Sumoo luktis 161 esperantistoj de 26 landoj kaj ni kune entute legis 13.000 paĝojn. Mia rango nun estas Jokozuna 42 kaj la supraj 41 partoprenantoj estas malmolaj luktantoj, do mi devas daŭrigi mia librolegado kaj venki ĉiam.

Por aliĝi al la Sumoo luktado unue legu pri ĝi en la retpaĝo <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html> kaj poste sendu retmesaĝon al Hori Jasuo [horizonto@water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@water.sannet.ne.jp), kaj li enkondukos vin.

Do legu librojn por ke via mondo ŝangiĝu !



▶ estas en preskaŭ sama nivelo rilate al respektivaj biletprezoj kaj vojaĝkostoj, pro kio trajno fariĝas akceptebla elekto por veturado. Tamen restas la problemo de tempo bezonata por veturado, kiu plej ofte plifavorigas la ŝosean transporton.

En la internacia transporto regulaj prezoj de fervojbiletoj



estas averaĝe duoble pli grandaj ol prezoj de busbiletoj, sed per specialaj ofertoj la fervojaj prezoj estas plejparte pli favoraj ol la busaj. Regulaj prezoj de aviadbiletoj estas proksimume en la niveloj de regulaj fervoja prezoj (tarifoj), sed "malaltkostaj" aertransportistoj laŭpreze ofte estas en la nivelo de specialaj fervojaj ofertoj. Iufoje ili kaj la fervojoj povas sukcese konkuri samtempe al ŝoseaj kaj "normalprezaj" aertransportistoj.

La fontoj kaj dokumentoj en kiuj troviĝas la rezultoj de la analizoj estas la jenaj:

1. *Negoca jarraporto por 2011*; HŽ-Pasaĝera transporto

d.o.o.; [www.hzpp.hr/2011](http://www.hzpp.hr/2011)

2. *Negoca jarraporto por 2011 de kunligitaj kompanioj de HŽ-Holdingo d.o.o.* (kaj koncerna *Negoca jarraporto por la 2005*)

3. *Negocaj planoj de HŽ-Pasaĝera transporto d.o.o.*

La originala prelego prezentita dum la 65-a IFEF-kongreso en Artigues-près-Bordeaux kaj la prelego prezentita en la 61-a IFEF-kongreso en Triesto estas konsulteblaj en la retejo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) <http://www.ikef.org>





# BOAT-AVENTURO SUR LA RIVERO KUPA

*Srećko Radulović*

Ankaŭ ĉi-jare **Esperanto-societo "Sisak"**, helpita de Esperanto-societo "**Viktor Mihovilić**" (Karlovac), **Esperanto-societo "Mondo paca"** (Velika Gorica), **Esperanto-societo Petrinja** kaj **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE)**, organizos boatadon sur la rivero **Kupa**. Temas pri la 6-a jaro de tiu ĉi aranĝo, organizata okaze de Tago de la venko kaj patrolanda danko, kiun en Kroatio oni festas la 5-an de aŭgusto.

Samtempe, la aranĝo rememorigas pri la "**Grenvojo**", la historia rivera transportvojo, kiu ekzistis ekde la tempo de Romianoj. Sian kulminon tiu trafikdirekto havis en la 18-a kaj 19-a jarcentoj, dum kiuj evoluis grenkomercado, kiu al Sisak kaj Karlovac donis la gravecon de la plej grandaj transitaj kaj komercaj centroj inter la kontinenta kaj mara partoj

de la lando. Tra la rivero **Kupa**, oni transportis grenon, lignan konstrumaterialon, tabakon, felojn, mielon, vakson kaj aliajn produktojn el **Sirmio, Baĉko, Banato, Slavonio, Posavino** kaj **Pokuplje**. Laŭ la ŝoseoj el la marborto oni transportis fiŝojn, spicojn, oleon ... La varoj estis deponitaj en **Sisak** kaj **Karlovac**, por poste en ŝipoj aŭ sur ĉevaloj transportiĝi al diversaj flankoj, depende de navigebleco sur la rivero **Kupa** kaj trapaseblo de ŝoseoj.

Kroataj esperantistoj jam la sesan jaron organizas originalan boatadon sur la rivero **Kupa** en popularaj (motor)boatoj de tiu regiono. La boatado okazos inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto, en kvin vojspartoj. Dum la boatado okazos kulturaj kaj turismaj programoj, prelegoj, kursoj de Esperanto, fiŝkaptado kaj boatstirado. La boatado startos

en **Karlovac** kaj finiĝos en **Sisak**. Se vi estas iomete aventurema, kaj se por vi sufiĉas bivakado kaj simpla vivado en la naturo, vi estas bonvena! Kotizo por la boatado por plenkreskuloj kostas 400,00 kunaajn, por infanoj (ĝis 15-jaraj) 200,00 kunaajn, kaj por eksterlandanoj 100,00 eŭrojn kaj por infanoj 50 eŭrojn. La prezo inkluzivas transporton de Sisak al Karlovac, boatadon de Karlovac ĝis Sisak, tri manĝojn tage, urbovizitadon de Karlovac kaj Petrinja, prelegojn, kursojn kaj aliajn programojn. Pri aliaj detaloj informiĝu ĉe la organizanto: **Esperanto-societo "Sisak", Lonjska 74, HR-44000 Sisak, Kroatio**; telefono: **099/243 33 52** kaj rete: **boatado.kask@gmail.com**

La redakcio de "Zagreba Esperantisto" publikigos pli ampleksan raporton pri la aranĝo post ĝia okazigo.

# KIEL FUNKCIIGI ESPERANTO-KURSEJON?

*LEE Jungkee*  
(Estrarano de UEA)

**Ĉu la Esperanto-movado estas progresanta?**

Laŭ la statistiko de la membro-nombro en 2012, UEA havis 15.801 membrojn. Por UEA, kiu estas internacia organizaĵo, la nuna membro-nombro ne povas esti atentinda en la internacia medio. Serioza problemo por UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale estas, ke la statistiko montras ĉiujaran malkreskon.

Kiel ni solvu tiun ĉi seriozan problemon? S-ro Zlatko Tišljär, la sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio konfesas, tra la revuo "Eŭropa Bulteno" (n-ro 130, septembro 2013), ke la Esperanto-movadoj en Hamburgo, Slovenio, Zagrebo, Londono, Svedio kaj Grekio okulfrape kadukiĝis kaj malfortiĝis pro manko de membroj.

Por solvi tiun ĉi malfacilan problemon, mi proponas, ke en ĉefurboj de unuopaj landoj ni starigu Esperanto-kursejojn, por varbi novajn esperantistojn. Sen semado

ni neniel kaj neniam povos rikolti. Surbaze de mia propra sperto, mi prezentas konkretan utilecon de Esperanto-kursejo.

**Kial mi starigas Seulan Esperanto-Kulturcentron (SEK)?**

Por instrui Esperanton al civitanoj kiuj volas lerni ĝin, mi fondis SEK-on en la jaro 1991. SEK volis roli kiel fenestro al internaciaj kontaktoj pere de Esperanto. Plie, ĝi volis prezenti Esperanto-librojn al potencialaj legantoj, kaj tial ĝi funkcias ankaŭ kiel libroservo.

**Kiujn nivelojn de kursoj SEK funkciigas?**

Elementa kurso de SEK daŭras unu monaton kaj okazas ĉiusabate (kvarfoje po tri horoj). Do, sume ĝi daŭras 12 horojn. Post elementa kurso okazas trimonata meznivela kurso, en kiu oni lernas "200 bonajn frazojn", kiuj troviĝas en la lernolibro. Post trimonata kurso

oni ĝuas Esperanto-literaturon, legante konatan librojn, kiujn verkis fame konataj Esperanto-verkistoj.

**Kiel sukcese funkciigi Esperanto-kursojn?**

Por longtempa funkciado de la kursejo ne gravas ĝia grandeco, sed konstanteco. Luado de ejo devas postuli negrandan sumon. La kursejo nepre troviĝu en la centra parto de ĉefurbo, por facile interesigi civitanojn. La kursoj davas okazadi daŭre kaj senpaŭze. Nombro de kursanoj ne estas grava, respektive kvalito pli gravas ol kvanto. Por daŭrigi la kursojn longe kaj konstante, kurso-organizanto dekomence numerigu ilin, kaj okazigu festetojn (ekz. oni havu feston en la 50-a aŭ 100-a kurso...).

**Por fari fortan UEA**

Post la kurso, la kursgvidanto instigu la kursanojn aliĝi al UEA. Iu, kiu lernis







Esperanton, ne nepre aliĝos al UEA sen instigo deflanke. Ĉe esperantistoj ni flegu intereson pri internacia organizaĵo, kiu gvidas la Esperanto-movadon mondscale.

Ju pli da Esperanto-kursoj okazos tra la mondo, des pli povos multiĝi ankaŭ la membro-nombro de UEA.

Mi volas emfazi, ke malgraŭ la nuntempe populara lernado pere de interreto, por savi la nunan movadon el la membro-krizo, ni devas nepre starigi ankaŭ Esperanto-kursejojn, kiuj funkcias konstante kaj senpaŭze.

Miaj propraj spertoj konfirmas tiun neprecon.

## NOVAĴOJ EL STUDENTA ESPERANTO-KLUBO

*Mihaela Cik*

**Studenta Esperanto-Klubo** (SEK) el Zagrebo decidis iom vigligi siajn aktivecojn per kurso de Esperanto por komencantoj. Mardajn renkontiĝojn en la klubejo, kiuj komenciĝis la 29-an de aprilo kaj daŭris ĝis julio, partoprenis grupeto de gejunuloj, plejparte studentoj, sed ankaŭ mezlernejanoj. Pro tio mi esperas, ke **Studenta Esperanto-Kluba** havos pli brilan estontecon. Mi gvidis kurson laŭ la

Zagreba metodo kaj unu parto de ĉiu prelego donis pli da atento al vortoj kaj esprimoj de ĉiutaga Esperanto. Ofte estis uzitaj metodoj por pli bona memorado kiel kartludoj aŭ partoj el la lernolibro de Esperanto laŭ la rekta metodo de **Stano Marček**. Kelkfoje en SEK prelegis **Dalibor Šeatović** kaj **Spomenka Štimec**.

Nia kurso estas ankaŭ parto de junulara projekto, kies ĉefa

tasko estas edukado de gejunuloj pri organizado de internaciaj kunvenoj. Ĝuste tial la Urbo Zagrebo finance helpis tiun projekton kaj partoprenon de nia grupeto ĉe la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka de 6-a ĝis 12-a de julio. Krom plenumi organizajn, teknikajn kaj informajn taskojn ĉe la kongreso, ni laboris kun la estraranino de TEJO **Veronika Poór** por plibonigi niajn lingvajn spertojn kaj reaktivigi la junularan movadon.

Aparte menciinda estas nia renkontiĝo kun la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio d-ro Seán O'Riain, okaze de lia vizito al Zagrebo. La kursanoj tiel havis tre oportunan eblecon vidi kaj aŭdi kiel Esperanto vere funkcias en la komunikado. Por plia diskonigo de nia agado estas merita skipo de studenta televido **Televizija Student**, kiu preparis elsendon pri plej diversaj aspektoj de Esperanto en Kroatio. Krome, nia kurso estas registrita en **Kursejo ĉe edukado.net**, paĝaro por instruistoj, kursgvidantoj kaj memlernantoj.



## HUMANECO ESPRIMITA PER AGO

Hrabren Kudumija, la juna membro de **Bjelovara Esperantista Societo**, fariĝis unu el la plej aktivaj volontuloj en la urba filio de la **Ruĝa Kruco** en Bjelovar. Okaze de kolektado kaj distribuo de bezonaĵoj por viktimoj de inundoj, kiuj maje trafis Kroation, per sia volontula laboro Hrabren esprimis grandan humanecon kaj solidarecon, la kvaliton kiu ĉiam pli mankas en la nuntempa socio. Jen li kun siaj ruĝkrucaj gekolegoj (staranta meze de la foto), antaŭ ol startos nova sendaĵo por la inundita Slavonio.



## EKZAMENO EN BJELOVAR



Per ekzameno okazinta la 12-an de junio en la restoracio "Ŝenoa", en Bjelovar finiĝis porkomencanta kurso, kiun ekde marto gvidis **Josip Pleadin**. La ekzamenon sukcese finis kaj ricevis koncernajn atestilojn de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto 9 kursanoj. La kurso estis ebligita per malavara donaco de anonima membrino de Bjelovara Eseperantista Societo.

## EEU-KONGRESO INAŬGURITA

La 6-an de julio grupo de kroataj esperantistoj vojaĝis al Rijeka, por partopreni "**Kroatan tagon**", kiu estis uverturo al la inaŭguro de la **10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio**, okazinta tagon poste. La aranĝon aŭspicias la kroata ŝtatprezidento **Ivo Josipoviĉ**, kaj diversmaniere favoras lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj. Kvankam ŝajnas ke ĝi estas unu el la plej malgrandaj ĝisnunaj EEU-kongresoj, ĝojigas ke ĝi okazas en Kroatio. Pri la aranĝo ni publikigos ampleksan raporton en la sekva numero.





## ESPERANTISTOJ DE SZEGED VIZITIS BJELOVARON

Dimanĉon, la 6-an de julio, **Bjelovar** estis vizitita de esperantista grupo el la hungara urbo **Szeged**, vojaĝanta al **Rijeka**, por partopreni la 10-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio. La gastojn akceptis la Estraro de Bjelovara Esperantista Societo. Dum la komuna tagmanĝo en la restoracio "**Glamur**" oni interparolis pri proponoj por estonta kunlaboro, kiu estos daŭrigota per komuna vizito de Bjelovaranoj al **Szeged**. Grupo de dudeko da bjelovaraj esperantistoj veturos la 19-an de julio al **Szeged** por partopreni la 5-an Memortagon, kiun jam tradicie organizas la tieaj esperantistoj. La delegacio de hungaraj esperantistoj

denove planas viziti Bjelovaron okaze de Tago de la urbo, por partopreni la programojn de la manifestacio "**Esperantistoj de Bjelvoar al sia urbo**". Bjelovaraj esperantistoj por tiu aranĝo elektis Hungarion kiel partneran landon. En la programo estas planata ronda tablo "**Tuŝpunktoj de kroata kaj hungara historioj**", en kiu partoprenos ankaŭ hungaraj prelegantoj. Ili partoprenos ankaŭ en la deklamkonkurso, kaj eblas ankaŭ interŝanĝo de pentrafekspozicioj.

Por la kunlaboro de bjelovaraj kaj segedaj esperantistoj, sian intereson montris ankaŭ hungara minoritato de la Departemento Bjelovar-Bilogora.

## ILONA KOUTNY EN ZAGREBO

**Prof. dr. Iona Koutny**, gvidanto de la **Interlingvistikaj Studoj** en **Poznano** (Pollando), vizitis Zagrebon inter la 25-a kaj 29-a de junio, por partopreni la projektrenkontiĝon de **Lingvo.info**, kiu okazis la 26-an kaj 27-an de junio.

La projekton **Lingvo.info** kune realigas **Eŭropa Esperanto-Unio** kaj **E@I**, kaj ĝia celo estas rekonstrui la retejon **www.lingvo.info**, konstruitan en 2003. Post la renovigo la retejo enhavos informojn pri lingvoj kaj inter la 17 lingvoj uzitaj de la retejo, troviĝos ankaŭ Esperanto. La projekto estas realigata de 9 partneraj organizoj, kaj ĝia suma valoro estas 530.000 eŭroj (el kio 400.000 donas Eŭropa Unio kaj la ceteron la partneroj en la projekto). La tuta projekto devus esti realigata inter decembro 2012 kaj novembro 2014.

S-ino **Koutny** eluzis sian restadon en Zagrebo ankaŭ por renkonti lokajn esperantistojn, kaj diskonigi informojn pri la **Interlingvistikaj Studoj**. La redakcio de "**Zagreba Esperantisto**" ricevis ŝian promeson pri speciala intervjuo.






**ILEI-KONFERENCO EN BJELOVAR?**

La Departemento Bjelovar-Bilogora atribuis al Bjelovara Esperantista Societo (DEB) sumon de 5.000 kunaoj por kovri elspezojn de la kandidatiĝo de Bjelovar por gastigi ILEI-konferencon. La Estraro de DEB decidis eldoni specialan prospekton, kiun pere de Universala Esperanto-Asocio (UEA) el Roterdamo oni distribuos inter la partoprenantoj de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero (Argentino), kaj Marija Jerković el Zagrebo distribuos la saman prospekton inter la partoprenantoj de la ILEI-konferenco en Montevideo (Urugvajo). En la prospekto estas publikigitaj leteroj, per kiuj sinjoroj departementestro **Damir Bajš** kaj urbestro **Antun Korišec** subtenas la ideon inviti ILEI-konferencon al Bjelovar. Estas presitaj 2000 ekzempleroj de la prospekto, kiu jam estas sendita al UEA en Roterdamo. La grafikan aranĝon de la prospekto senpage faris konata bjelovara grafikdezajnistino **Krešimir Ivanček**.

**TRiesto, INTER KARSTO KAJ MARO – MAGIAJ ITINEROJ**

Triesta Esperanto-Asocio en decembro 2013 publikigis la gvidlibron "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj Itineroj", verkitan de Elda Doerfler. Temas pri 108-paĝa, kolore ilustrita gvidlibro pri Triesto, kun ĝia konciza historio kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj en la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉi tiu tre valora helpilo por esperantistoj vizitantaj Trieston mendeblas je 12,00 eŭroj plus sendokostoj (minimуме 6,00 eŭroj al eksterlando) ĉe: [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it) aŭ [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)



**FERVOJISTA SOCIETO 60-JARA**

**Kroata Fervojista Esperanto-Societo (KFEA) el Zagrebo en 2014 fariĝos 60-jara!** Fervojista Esperanto-Societo en Zagrebo, kies rekta posteulo estas KFEA, fondiĝis la 23-an de decembro 1954, post la prepara laboro de fervojistoj **Franjo Debić, Drago Šnajdar kaj Josip Cetina**.

**NOVA SOCIETA INFORMILO**

En majo aperis la unua numero de nova societa informilo titolita "Bjelovara folio", eldonata de Bjelovara Esperantista Societo. Redaktata de Zdenka Polašek, "Bjelovara folio" estas distribuata ĉefe en elektronika formo, sed riceveblas ankaŭ kiel papera printaĵo. Ĝi aperos neregule, laŭ bezonoj de la eldondato. La celo de tiu ĉi informilo estas dulingve (kroate kaj Esperante) informi la membraron kaj interesigaĵojn pri Esperanto kaj pri la aktivecoj de Bjelovara Esperantista Societo, kiu ĉi-momente estas unu el la plej aktivaj kroataj societoj.

Se vi volas ricevadi "Bjelovaran folion", bonvolu peti ĝin ĉe la redaktoro: [polasek.zdenka@gmail.com](mailto:polasek.zdenka@gmail.com) aŭ ĉe la societo: [esperanto.bjelovar@gmail.com](mailto:esperanto.bjelovar@gmail.com)

**BJELOVARA FOLIO** majo 2014 / n-ro 1  
INFORMILO DE BJELOVARA ESPERANTISTA SOCIETO

<p><b>POZONOVO "ZELEN" BJELOVAR</b></p> <p>Esperantistoj de Bjelovar, kiuj en 1950 gvidis, kiel ja, la unuan gvidlibron "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj Itineroj", verkita de Elda Doerfler, estas en 2014 gvidataj de Elda Doerfler. Temas pri 108-paĝa, kolore ilustrita gvidlibro pri Triesto, kun ĝia konciza historio kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj en la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉi tiu tre valora helpilo por esperantistoj vizitantaj Trieston mendeblas je 12,00 eŭroj plus sendokostoj (minimume 6,00 eŭroj al eksterlando) ĉe: <a href="mailto:esperantotrieste@yahoo.it">esperantotrieste@yahoo.it</a> aŭ <a href="mailto:testudo.ts@gmail.com">testudo.ts@gmail.com</a></p>	<p><b>DENOVE "VERDA" BJELOVAR</b></p> <p>Esperantistoj de Bjelovar, kiuj en 1950 gvidis, kiel ja, la unuan gvidlibron "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj Itineroj", verkita de Elda Doerfler, estas en 2014 gvidataj de Elda Doerfler. Temas pri 108-paĝa, kolore ilustrita gvidlibro pri Triesto, kun ĝia konciza historio kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj en la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉi tiu tre valora helpilo por esperantistoj vizitantaj Trieston mendeblas je 12,00 eŭroj plus sendokostoj (minimume 6,00 eŭroj al eksterlando) ĉe: <a href="mailto:esperantotrieste@yahoo.it">esperantotrieste@yahoo.it</a> aŭ <a href="mailto:testudo.ts@gmail.com">testudo.ts@gmail.com</a></p>
--	--

**SASTANCI IPRANOG ODOBRA**

Esperanto-Societo de Bjelovar, kiuj en 1950 gvidis, kiel ja, la unuan gvidlibron "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj Itineroj", verkita de Elda Doerfler, estas en 2014 gvidataj de Elda Doerfler. Temas pri 108-paĝa, kolore ilustrita gvidlibro pri Triesto, kun ĝia konciza historio kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj en la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉi tiu tre valora helpilo por esperantistoj vizitantaj Trieston mendeblas je 12,00 eŭroj plus sendokostoj (minimume 6,00 eŭroj al eksterlando) ĉe: [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it) aŭ [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

**KUNVENO DE LA ADMINISTRA KOMITATO**

La Administra Komitato de DEB aligis sian komitaton la 15-an de majo en la urbo de Bjelovar. Temas pri la komitato de Bjelovara Esperantista Societo, kiu ĉi-momente estas unu el la plej aktivaj kroataj societoj.

**ĜODIŠNA SKUPŠTINA DRUŠTVA**

La Ĝodiŝna Skupŝtina de DEB okazis la 25-an de majo en la urbo de Bjelovar. Temas pri la Ĝodiŝna Skupŝtina de Bjelovara Esperantista Societo, kiu ĉi-momente estas unu el la plej aktivaj kroataj societoj.

**JARKUNVENO DE LA SOCIETO**

La Jarkunveno de DEB okazis la 25-an de majo en la urbo de Bjelovar. Temas pri la Jarkunveno de Bjelovara Esperantista Societo, kiu ĉi-momente estas unu el la plej aktivaj kroataj societoj.

# INTERESAĴOJ EL LA MALNOVA KONGRESA ALBUMO

*Josip Pleadin*



89



90



91



92



93



94

Antaŭ mi kuŝas vera raraĵo: **Albumo de la 8-a Universala kongreso esperantista**, okazinta en **Krakovo** en 1912. Ĝi okazis en la jaro de la 25-a datreveno de la lingvo Esperanto. Estis tempo de junaĝo de nia lingvo kaj movado.

En la **Albumo** presitaj multaj malnovaj fotoj, kiuj prezentas ĉefe junajn kaj mezaĝajn esperantistojn de tiu epoko. Evidente tiutempe nia movado estis nekompareble pli juna ol en nia epoko! El la paĝoj rigardas nin barbuloj kaj lipharuloj kun kravatoj, uniformitoj, damoj kun ĉapeloj kaj puntaj bluzoj. Tiun **Albumon** mi serĉis jam delonge, sed ĝi estis tre rara libro, kaj apenaŭ antaŭ kelkaj monatoj al **Dokumenta Esperanto-Centro** donacis ĝin **Tomasz Chmielik** el Pollando. La intereso kiun mi havis por tiu **Albumo** fontas el la fakto, ke ankaŭ kroataj esperantistoj partoprenis la 8-an UK-on en Krakovo. Mi volis esplori pri kiuj personoj temis.

Post nelonga serĉado mi trovis ilin sub la numeroj 89 ĝis 93. La **Albumo** mencias kvin nomojn, sed evidente nur kvar el ili partoprenis la kongreson, ĉar la kursive signita **Marija Jožičić** (n-ro 90) fratino de la veterana kroata esperantistino **Antonija Jožičić** (n-ro 89) el **Kostajnica**, efektive ne partoprenis. Ne mirigas la partopreno de **Mavro Špicar** (n-ro 92) kaj **Antonija Jožičić**, ĉar ili evidente estis la plej famaj

esperantistoj de tiu epoko en Kroatio, sed pli surprizas foresto de **Danica Bedeković!**

La fotoj konigas al ni kiel aspektis la du aliaj kongresanoj: **Dragutin Kaničar** (n-ro 91) el Osijek kaj **Paŭlo Stanišić** (n-ro 93) el Vinkovci. Kaničar estis unu el la plej malnovaj osijekaj esperantistoj, kaj nun ni povas konvinkiĝi pri la simileco al Zamenhof, kiun jam antaŭen aludis la zagreba Esperanto-historiisto **Marinko Gjiwoje** en sia biografia leksikono de jugoslavaj esperantistoj. La vizaĝon de la advokato **Stanišić** antaŭe mi neniam vidis, ĉar lia foto mankas en la leksikono de **Gjiwoje** kaj en la kolekto de **Dokumenta Esperanto-Centro**.

Interesa fakto estas, ke apud la kroataj kongresanoj troviĝas ankaŭ unu el la plej fruaj ŝlovenaj esperantistoj, **Franjo Štupar** (n-ro 94) el Vodic apud Ljubljana, sur kies tombo ankoraŭ troviĝas monumento mencianta lian esperantistecon.

En la jaro de la kongreso, **Antonija Jožičić** havis 43 jarojn, **Mavro Špicar** 50 jarojn, **Paŭlo Stanišić** 39 jarojn, dum la aĝon de la aliaj ni ne konas. Malgraŭ tio, la fotoj en la **Albumo** impresas tute alie ol la nuntempa Esperanto-Movado, ĉar la nunajn UK-ojn vizitas ĉefe maljunuloj.

Trarigardi la **Albumon** certe estus interese ankaŭ por alilandaj historiistoj de Esperanto.

## GAZETOJ DE GWENDA SUTTON DONACITAJ AL DEC

La nov-zelanda esperantistino **Gwenda Sutton** el Wellington forpasis la 18-an de januaro 2014 en la aĝo de 89 jaroj. Dum multaj jaroj ŝi estis tre aktiva membro de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZA), ĉef-delegito de UEA en Nov-Zelando, instruis Esperanton al centoj da nov-zelandanoj, kaj vigle propagandis pri Esperanto. **David Ryan** nome de NZEA parolis pri Gwenda kaj Esperanto dum ŝia funebra ceremonio, kaj li ankaŭ plenumis la taskon dissendi Esperanto-librojn kaj gazetojn el ŝia postlasaĵo al esperantistoj kaj Esperanto-societoj, kiuj volis akcepti ilin. Parton de la mankantaj periodaĵoj ricevis ankaŭ **Dokumenta Esperanto-Centro** en Ĝurdevac (Kroatio).

## PUBLIKE PRI ESPERANTO

*Redakcia kompilo*

- **Večernji list** (Zagrebo) n-ro 18074 de la 5-a de majo 2014 publikigis grandan artikolon "*Stoljeće Ive Šutile; oca, kuglača i esperantista*" de ĵurnalisto Marin Bakić.

- **Slobodna Dalmacija** (Split) de la 10-a de majo 2014 publikigis sur la paĝo 31 la artikolon "*27 esperantista prevelo Sekelja*", aŭtoritan de Davor Grgat.

- **Slobodna Dalmacija** (Split) de la 12-a de majo 2014 sur la paĝo 10 publikigis la artikolon "*Rijeka dobila kongres europskih esperantista*", aŭtoritan de Davor Grgat.

- Portalo **Roster Town** (Đurđevac) la 16-an de majo 2014 publikigis la artikolon "*Međunarodni prevodilački projekt*". La saman tekston publikigis oficiala retejo de **Urbo Đurđevac** la 18-an de majo, kaj transprenis ĝin pluraj aliaj retejoj.

- En sia portalo la tekston "*Dokumentacijski esperantski centar*" publikigis **Podravski radio** en Đurđevac (87,6 MHz) la 20-an de majo. Malpli longan varianton la sama radio dissendis en sia novaĵelsendo la 20-an de majo je la 15h00.

- **Radio Koprivnica** (91,70 MHz) disaŭdigis la informon "*Četvero đurđevačkih esperantista prevodilo T. Sekelja*" la 19-an de majo, kaj publikigis ĝin en sia portalo: <http://www.radio-koprivnica.hr/>

- **Bjelovarac** (Bjelovar) n-ro 21 de la 29-a de majo 2014, sur la paĝo 33 publikigis la artikolon "*Esperantisti: Preveli Tibora Sekelja*".

- **Bjelovarski list** (Bjelovar) n-ro 297 de la 2-a de junio 2014, sur la paĝo 47, publikigis la artikolon "*Bjelovarski esperantisti*

*u međunarodnom prevodilačkom projektu*".

- La 8-an de junio 2014 **Glas Koncila** (Zagrebo), n-ro 23, sur la paĝo 21 publikigis artikolon de Vladimir Lončarević "*Pjesnički usponi Josipa Velebita*".

- La 12-an de junio 2014 **Slobodna Dalmacija** (Split) publikigis la artikolon "*Josipović primio esperantiste*", verkitan de Davor Grgat.

- La 14-an de junio 2014 la portalo de **Dugi Rat** publikigis la tekston de Davor Grgat titolitan "*Esperantisti kod predsjednika*".

- La 20-an de junio 2014 **Televizija Student** (Zagrebo), en sia programo "*Europski čušpajz*" elsendis filmon pri Esperanto, produktitan kunlabore kun Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo. La saman filmon ripetis la kvara programo de **Kroata Televido** kelkajn tagojn poste.

- La 1-an de julio 2014 la oficiala portalo de **Urbo Rijeka** publikigis la artikolon "*10. kongres Europske esperantske unije u Rijeci*".

- La 6-an de julio 2014 **Radio Rijeka** en la oficiala portalo publikigis la tekston de sia ĵurnalistino Tatjana Sandalj titolitan "*Esperantisti za jezično pravednu Europu*".

- **Slobodna Dalmacija** (Split) la 8-an de julio 2014 publikigis la artikolon "*Počeo kongres esperantista*" de sia kunlaboranto Davor Grgat.

- La 10-an de julio 2014 **Bjelovarac** (Bjelovar) en la numero 27, paĝo 30, publikigis la artikolon titolitan "*Mađarski i bjelovarski esperantisti za Dan grada*".



## ANTICA (TONKA) GRGAT (1933-2014)

Kun granda malĝojo ni eksciis, ke la 7-an de junio 2014 ĉesis bati la koro de **Antica Grgat**, karese nomita **Tonka**, la edzino de ĵurnalisto-esperantisto kaj nia konstanta kunlaboranto Davor Grgat el Dugi Rat.


Tonka naskiĝis la 28-an de marto 1933 en Pirovac, kaj ekde 1957 vivis en Split. Ŝi laboris en banko kaj Servo de socia librotenedo, kaj ekde 1970-aj jaroj en la fabriko

“Jugoplastika”. Pri Esperanto ŝi ekinteresiĝis en 1959 kaj lernis ĝin apud sia edzo. La geedzoj Grgat kune partoprenis plurajn Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj multajn enlandajn Esperanto-aranĝojn.

Tonkan karakterizis la ĉiama optimismo. En societoj ŝi estis ĉiam bonhumora, kaj la geedzoj Grgat, membroj de loka societo en Split, ofte gastigis esperantistojn en sia hejmo.



Nia redakcio kaj UZE esprimas sian plej koran kondolencan al ŝiaj familianoj.



## ANJA HURČAK (1918-2014)

Krapina (ĝis 1942), en la jaroj 1945-1948 kiel sekretario de gimnazio en Slavonski Brod, inter 1951 kaj 1958 kiel instruistino en la Porinstruista lernejo kaj en 1958 kiel direktorino en elementa lernejo samloke. Ekde 1958 ŝi vivis en Rijeka, kaj laboris kiel instruistino (1958-59) kaj direktorino (1959-1964) en Elementa lernejo “Vladimir Gortan”. De 1964 ĝis la pensiigo en 1976 ŝi instruis en la Vespera lernejo de Laborista Universitato, Medicina mezlernejo, Turisma lernejo centro Opatija kaj en kelkaj entreprenoj.

Esperantistino ekde 1934. En la Esperanto-movado ŝi plej multe kontribuis kiel pedagogo kaj krusgvidanto. Esperanto-kursojn ŝi gvidis ekde 1945 en la reorganizita Esperanto-societo en Slavonski Brod (en kiu ŝi plenumis funk-

ciojn de prezidanto kaj sekretario), en la Porinstruista lernejo kaj gimnazio en Slavonski Brod, en la Esperanto-societo de Rijeka, Esperanto-kampadejo Primošteno kaj en Bulgario. Ŝi estis prezidanto kaj sekretario de Esperanto-societo en Rijeka, kaj partoprenis en la organizado de pluraj grandaj aranĝoj de la societo (landa kongreso en 1960, SAT-kongreso en 1980, trilanda konferenco en 1981 ktp.).

La lastajn jarojn de sia vivo pro la malbona sano ŝi travivis en Maljunula hejmo sur la insulo Krk.

Ŝi posedis multajn Esperantaĵojn. Granda parto de ŝia kolekto malaperis, sed valoran parton de libroj aĉetis Dokumenta Esperanto-Centro en interreta aŭkcio, kie ofertis ilin Rijekanino repreninta ilin el kontenero por rubaĵoj.

## AŬDIENCO ĈE LA KROATA PREZIDENTO IVO JOSIPOVIĆ



Merkredon, la 11-an de junio, delegacio de kroataj esperantistoj vizitis la kroatan ŝtatprezidanton **Ivo Josipović** okaze de la 10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, kies aŭspicianto li akceptis esti. En la delegacio estis d-ro **Seán O'Rian** (diplomato el Irlando kaj prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio), **Zlatko Tišljar**, **Nikola Rašić**, **Anto Mlinar**, **Spomenka Štimec**, **Boris Di Costanzo** kaj **Ďivo Pulitika**.

La vizito daŭris iom pli ol duonhoron. Komence **Seán O'Rian** prezentis la movadon kaj la ideojn de Esperanto, kaj **Nikola Rašić** tradukis. Poste la delacio prezentis projektojn kiujn la kroataj esperantistoj ŝatus partopreni. Oni ankaŭ parolis pri WikiTrans, programo kiu tradukas anglajn artikolojn ĉe Vikipedio en Esperanton. Ŝajnis ke la prezidento plej ŝatis vidi artikolon pri si mem en la universala lingvo.

Post kiam la prezidento interesiĝis pri Esperanta muziko, **Seán O'Rian** donacis (kaj kantis) la tekston de la Eŭropa himno en Esperanto. "*Ĝi estas tre melodia lingvo*", konkludis la prezidento.